



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Februaro 2019 n-ro: 50



Merhaba,

Ocak ayı bitiyor ama hala İstanbul'a kar yağmadı.
Turka Stelo 50. sayısı ile yeni bir rekora ulaştı.

Bu sayımızda da bir birinden ilginç yazılarla
karşınızdayız. Tavsiyelerimizden bazıları şu yazılar:

- Tempo Sigelita
- Epio-Laokoono
- Sena Wara Ohra
- Patrino
- Homaj Rajtoj
- La vekiĝo
- Poezia Mateniĝo
- La Perlo de Amo
- Satiraj Rakontoj de Sándor Szathmári

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


Januaro finiĝas sed ankoraŭ ne neĝis sur Istanbul.
Kun la 50-a numero Turka Stelo atingis novan
rekordon.

Ankaŭ en ĉi tiu numero estas interesaj artikoloj. Kelkaj
rekomenditaj tekstoĵ estas:

- Tempo Sigelita
- Epio-Laokoono
- Sena Wara Ohra
- Patrino
- Homaj Rajtoj
- La vekiĝo
- Poezia Mateniĝo
- La Perlo de Amo
- Satiraj Rakontoj de Sándor Szathmári

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

| | |
|--|----|
| Malfermo | 1 |
| Enhavtabelo | 2 |
| Kursoj | 2 |
| SES 2020-Historie unuan fojon en Ĉeĥio! | 2 |
| Esperanto Sumoo | 3 |
| UEA | 3 |
| TEJO | 3 |
| Leteroj de niaj legantoj | 4 |
| Tempo Sigelita | 5 |
| EPIO – ΛΑΟΚΟΟΝΟ (ΕΠΕΙΟΣ – ΛΑΟΚΟΩΝ) | 6 |
| Poemoj de Elena Popova | 8 |
| Sena Wara Ohra - Jaro Post Jaro | 9 |
| Patrino | 9 |
| Blogo de Klasifikanto | 10 |
| Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (parto 1) | 11 |
| Ŝercoj | 12 |
| Kurcvortenigmo | 12 |
| Pri nia movado | 12 |
| La Aŭtunaj Muŝoj (parto 21) | 13 |
| El la libro de "Dao de Jing" (41) | 12 |
| Franco KAFKO (Franz Kafka) | 15 |
| Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo | 17 |
| Poeziaĵoj de Ilir Zhiti | 18 |
| Dr. Isitobi Kozoŭ (parto 4) | 19 |
| La vekigo | 20 |
| Simio kaj Okulvitroj | 22 |
| Tragedio pro la atombomboj (parto 3) | 23 |
| Dimanĉa poezio: Stanislav Schulhof | 24 |
| La Unua Libro | 25 |
| Poezia mateniĝo | 25 |
| Neandertalaj homoj pluvivas (2) | 26 |
| La perlo de Amo | 27 |
| Satiraj rakontoj -- de Sándor Szathmári | 29 |
| Hjálmarskiða | 30 |
| Meditaĵoj de Millôr Fernandes | 30 |
| Ni lernu Esperanton! | 31 |
| Solvo de la krucvortenigmo | 31 |
| Facilaj rakontoj | 32 |

Kursoj



En la 12-a kaj 13-a de decembro, kadre de Zamenhofa Tago, okazis du kunvenoj por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

SES 2020-Historie unuan fojon en Ĉeĥio!

Jes ja, vi legas bone – la jam tradicia aranĝo SES (Somera Esperanto-Studado) okazos somere 2020 vere en Ĉeĥio! La historia urbo Kroměříž estos de la 18-a ĝis la 26-a de julio 2020 la gastiganto de tiu ĉi internacia, amiketosa somera Esperanto-lernejo.



Programo: La aranĝo havas tre riĉan programon – ne temas “nur” pri ordinara lernado de Esperanto. Kutime la programo de SES estas ege plena, intensa. Ĝi konsistas el kelkaj partoj:

- Antaŭtagmeze: instruado de Esperanto, kurso pri literaturo;
- Posttagmeze: ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.;
- Vespere: nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, karaokeo, diskoteko...

Ja kiu jam almenaŭ unufoje partoprenis, povas konfirmi, ke dum SES oni ne enuas :).

Instruado: estas esenca parto de la aranĝo – plejmulto ja venas ĉefe por plibonigi sian lingvo-nivelon! Kaj la Esperanto-instruadon gvidas dum SES ĉiam spertaj Esperanto-instruistoj en 6-7 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Aparte ekzistas kurso pri la Esperanto-literaturo kaj kulturo, kaj planata estas speciala aldona kurso pri la tradukado de/al Esperanto, gvidata de Mikaelo Bronštejn.

Ekskursoj: ege gravas, por ke partoprenantoj ekkonu la urbon/regionon, landon, en kiu ili troviĝas. La plano estas okazigi buntajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo – ja la regiono estas tre riĉa je vidindaĵoj! Ili tiom abundas, ke ne sufiĉos unu SES, por povi ĉiujn viziti :). Planitaj estas 2 tuttagaj ekskursoj (tamen samtage, do vi devos decidi, kiun lokon viziti) kaj eĉ 4 duontagaj! Kaj se vi hazarde jam konas la vizitotajn lokojn, ne malgaju – ankaŭ dum tiuj ekskursaj posttagmezoj estos preparita bunta programo en la SES-ejo mem. Cetere – la SES-teamo ege ĝojas, ke la ĉefa respondeculino pri ekskursoj bonkore akceptis esti Libuše Hýblová – la ĈEA-prezidantino!

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj

landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Finiĝis la 61-a Internacia Esperanto Sumoo, kiu okazis inter la 12-a kaj la 26-a de januaro 2019.

La analizoj de la Sumoo ankoraŭ ne estis pretaj dum nia redaktado de la februara numero de Turka Stelo revuo. Ni ilin publikigos en la posta numero.

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:


https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>



UEA



N-ro 843 (2020-01-22)
Deklaro de UEA kaj ILEI okaze de la Internacia Tago de Edukado, 24

januaro 2020

Nelson Mandela: "La plej potenca armilo por plibonigi la mondon estas edukado."

Universala Esperanto-Asocio (UEA), kune kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), gratulas Unuiĝintajn Naciojn kaj Unesko-n pri ties progreso, kunlabore kun ties Membro Ŝtatoj kaj kun neregistaraj organizoj kaj la civila socio, en plivastigo kaj en altigo de la kvalito de edukado tutmonde. [...]

N-ro 842 (2019-12-30)

Kongresa rezolucio de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE)

De la 21-a ĝis la 27-a de decembro 2019 okazis en Bujumbura, Burundo, la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA en kiu partoprenis 135 geesperantistoj el 9 landoj (Belgio, Burundo, DR Kongo, Italio, Kameruno, Madagaskaro, Tanzanio, Svislando kaj Togolando). [...]

N-ro 841 (2019-12-25)

UEA invitas IKU-prelegantojn por Montrealo ĝis 15.01.2020

Bv. noti la pli fruan limdaton por IKU-proponoj (Internacia Kongresa Universitato) dum la UK en Montrealo. UEA invitas personojn kun taŭgaj kvalifikoj kandidatiĝi ĉe la IKU-sekretario Amri Wandel (amri@huji.ac.il) plej laste la 15-an de januaro 2020. [...]

TEJO



Konkurso "Partoprenu IJK-n" 2020

Jam tradicie la fonduso Partoprenu IJK-n pretas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson. La IJK 2020 okazos de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2020 en Someren, Nederlando. Dank' al la Fonduso eblas parte kovri vojaĝkostojn laŭ plej malmultekosta maniero (la gajnintoj ricevos ĝis 80% de ĉiuj vojaĝkostoj), la loĝadon en la plej malmultekosta kategorio kaj la programkotizon. [...]

Malferma alvoko: Iĝu estrarano de TEJO

Laŭ decido de la Komitato de TEJO la 31-an de decembro 2019, TEJO lanĉas malferman alvokon por kompletigi sian estraron. Kandidato por iĝi estrarano de TEJO devas esti individua membro de TEJO en 2020 kaj esti naskita inter la 1-a de septembro 1984 kaj la 31-a de januaro 2002. Aliaj dezirindaj kvalitoj de kandidato estas sperto en gvidado de volontula organizo, sperto en la (junulara) Esperanto-movado, taŭga lingvonivelo por internacia kunlaboro, laboremo kaj fleksebleco. [...]

Nova numero de Revuo

Kontakto: Tero – La Ludpilko de la Universo

Jen la nova numero de Revuo Kontakto, kiu aperis tuj antaŭ la fino de la jaro. La abonantoj povas elŝuti la elektronikan version de la revuo. Enkonduko de la redaktoro Rogener Pavinski [...]



Leteroj de niaj legantoj



Karaj, Gratulojn pro la interesa 48-a numero de la revuo. Koran dankon pro la publikigo de mia artikolo. Mi sincere deziras al "TS" multajn sukcesojn dum la 2020 jaro. Feliĉan novjaron al ĉiuj legantoj de Turka Stelo!

Amike vin salutas,

Hasan el Anglio



Koran dankon pro la januaro numero de Turka Stelo. Tiel rapidaj ni ne estas pri Ora Ĵurnalo, ni eĉ ne komencis pri ĝi, ĉar Kristnasko estas granda festo en Svedio, kaj parencoj kuniĝas. La novan jaron ni bonvenigas meznokte la 31an de decembro per artfajrado. Mia komunumo Lerum, ekster Gotenburgo ĉesis pri la artfajrado, konsiderante la influon al la medio kaj la protestojn de hund- kaj katposedantoj, kies dombestoj timiĝas je la bruo kaj eklumo. Sed en Gotenburgo granda artfajrado restas. Belege!


Mi rekomendas vian revuon "Turka Stelo" al miaj esperantoparolantaj geamikoj!

Siv Burell el Svedio



Estimata: Kun granda ĝojo mi ricevis la unuan valoran donacon en la Nova Jaro 2020: la januaran numeron de la ĉarma Turka Stelo. Vera antologio de belaj tekstoj prozaj kaj poeziaj, rakontaj kaj eseaj, tiel ke estas malfacile elstarigi unu el ili. Tamen mi tre ĝuis la mitologian rakonton pri Belorofono, inter aliaj. Ankaŭ la Blagan Blogon mi ŝategas! Gratulon pro via valora laboro kaj dankegon! Feliĉan Novjaron!

Paulo S. Viana el Brazilo



Koran dankon pro via sendado de Turka Stelo kaj feliĉan jaron 2020, multe da energio por daŭrigi vian pozitivan rolon en la movado kaj alfronti viajn personajn problemojn, kiuj 'espereble' restos kiel eble plej malgravaj. Amike,

Franciska Toubale el Aŭstralio



Hola kara, Ĉi tiu numero venas kiel donaco okaze de Novjaro 2010. Egan dankon ankaŭ pro publikigo de pliaj poeziaĵoj de Ilir Zhiti. Feliĉan novan jaron! Ĝis

Bardhyl Selimi el Albanio



Por 2020 mi deziras nur pacon, pacon kaj pacon, kaj sanon, bonfarton, feliĉon, kaj sukceson, kaj bonegan progreson, kaj

evoluon de nia belega lingvo Esperanto kaj de via revuo TURKA STELO. Mi trovis miajn fotojn kaj mian bildon MIA PATRO KUN MANDOLINO kaj tekston pri mandolinoj. Plaĉas kiel vi enmetis ĝin. Mi feliĉas.

Dankegon pro via bona TURKA STELO.

Helga Plötner el Germanio



Kara, Dankon pro la regula alsendo de via revuo! Por la nun komencitaj novaj jaro kaj jardeko mi deziras al vi kaj via revuo ĉion bonan.

Amike,

Utho Maier el Germanio



Saluton karaj samideanoj (el Turkio kaj aliaj landoj)! Mi estas 61-jaraĝa baŝkira esperantisto (verŝajne, sola!) ekde la jaro 1973, mia plumnomo estas Gafur Gazizi, mi loĝas en la urbo Salavat, sude de Baŝkortostano. Tute hazarde kaj tute surprize mi konatiĝis kun la revueto "Turka Stelo". Mi admiras, kia grandioza laboro estis farita kaj kiel amplekse laŭ enhavo, kaj brile laŭ kvalito. Mi envias al la sukcesa re-disfloro (miamemore, iam estis ekfloranta aktiva kultura vivo de esperantistoj sur la turkia tero?) de Esperanta kulturo en Turkujo. Bedaŭrinde, mi dum multaj jaroj estis dormanta, malaktiva en la E-agado (pro mia troa okupiteco en laboroj kaj klopodoj por persona kaj familia vivo). En la nuna tempo mi iom post iom vekigis el mia pasiveco kaj dormo, dank'al tio, ke mi ne plu estas okupita de personaj laboroj (mi estas pensiulo). Mi intencas reaktiviĝi por re-krei en Baŝkirio esperantistan agadon, kiun ni ĝuis en la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento (kiam en Ufa - ĉefurbo de Baŝkirio - vivis fama kaj grandioza esperanto-intelektulo Boris Kolker). Mi esperas iom kontribui al via revuo per miaj versoj (iam "florintaj" en la eks-soveta Uralio). Mi pensas ankaŭ iom ĉi-loke konatigi homojn en mia urbo kaj en la tuta Baŝkortostano kun la plu-vivanta Esperanto en la tuta mondo kaj, precipe, en Turkujo. Bonan ekzemplon kaj inspiron al mi donas la agado de turkaj samideanoj kaj la revuo "Turka Stelo". Mi gratulas vin ĉiujn okaze de la veninta nova jaro kaj deziras ĉion plej bonan al vi ĉiuj en la vivo kaj en la esperantista agado. Mi esperas pri nia bona estonta kunlaboro. Sanu kaj viglu, karaj kamaradoj! Sincere via,

Gafur Gazizi

(kiu nun kaŝas sin sub la alia plumnomo **Karlos Bodleros**, reminiscenco el mia ŝatata franca poeto Charles Baudelaire).

RANG E KHODA
(Koloro de Dio)

“Irana kulturo estas kulturo de rakontoj; ni kreskis aŭskulante la rakontojn de nia familio. Patrinoj al siaj infanoj, avinoj al siaj genepoj eldiras rakontojn. Multaj el tiuj estas mitaj rakontoj. En Irano ankaŭ la tradicio de poezio estas forta. En ĉiu domo troviĝas la Korano kaj apud ĝi troviĝas la rakontaro de Hafizo. ¹ Eĉ en la plej foraj lokoj de Irano homoj konas Hafizon kaj scias liajn poemojn. Rakontoj kaj poemoj efikis tre multe niajn homojn kaj artojn. En multaj partoj de la mondo la kinoarto de Irano estas priskribita kiel “poezia kino”. Min ankaŭ efikis tiuj poemoj. En miaj filmoj vi provas vidi la efikon de irana popolkulturo.”

“La antaŭa kaj posta tempo de la revolucio tute ne efikis mian sintenon. Mi ĉiam havis konserveman perspektivon. Produkti filmojn por mi ne estas profesio; mi al tio rigardas kiel mision. Mi faras tion, kio elvenas el mia interno, mi provas nur filmi tion, al kio mi kredas. En ĉiu filmo, kiun mi faras, mi sentas, ke mi evoluas kaj maturiĝas spirite.”

(Meĝid Meĝidi, Revuo Anlayış, Januaro 2006, intervjuisto Hakkı Uygur.)

Meĝid Meĝidi, la direktoro de la filmo “La Koloro de Dio” (en la angla oni tradukis la titolon kiel “La Koloro de Paradizo”), estas reprezentanto de la ŝtata ideologio kaj de la kino arto kiu en kelkaj fontoj estas konata kiel “kino de Irfan”. Meĝidi, kiu en



la jaro 2015 filmis la vivon de profeto Mohamedo, estas artisto kiu devas esti pritaksita ne nur kun sia ideologio kaj kredo, sed ankaŭ kun sia majstreco de rakontado. Lia lasta filmo estas “Preter la Nubo”, kiun li filmis en 2017.

Ni revenu al “Rang e Khoda” !

Ĝi estas rakonto pri senigo de blinda knabo kiu provas senti kaj provas ami la mondon per siaj manoj. Kaj ankaŭ lia patro estas tiel. Malgranda Mohamedo neniam vidis la amon de sia patro. Sed en le mezo de la filmo ni komprenas, ke lia patro Haŝim en sia vivo

multfoje spertis la baton de sorto. Ni forte kontraŭagas, kiam ni vidas, ke li prenas la knabon kaj liveras ĝin al ĉarpentisto por fariĝi metilernanto. Sed Haŝim ne estas kruela homo. Li ankaŭ en malgranda aĝo perdis sian patron kaj poste forpasis sia edzino. Liaj aferoj ĉiam iris pli kaj pli malbone kvankam li laboras kaj klopodas tiom multe.



La dramon de patro kaj lia filo ni vidas en la replikoj de la sinsekvaj scenoj.

La filo ploregas kaj alparolas al sia ankaŭ blinda majstro, la ĉarpentisto :

“Neniu amas min! Eĉ mia avino! Ĉar mi estas blinda, ĉiuj evitas min. Se mi povus vidi, tiam mi irus kun la aliaj geknaboj al la vilaĝa lernejo sed nun mi devas iri al la lernejo kiu estas en la alia parto de la mondo. Nia instruisto diras al ni, ke Dio amas nin pli ol siaj aliaj servantoj. Mi diris, ke se tio estus vero, Li ne kreus nin blindaj por ke ni povu vidi Lin. Nia instruisto diris ‘Dio estas nevidebla. Li troviĝas ĉie. Lin vi nur povas senti. Lin vi povas senti kun la pintoj de viaj fingroj.’ Mi ĉion kaj ĉie palpos pro trovi Lin kaj kiam mi sukcesos trovi Lin, tiam la sekretojn de mia koro kaj ĉion mi rakontos al li.”

Patro Haŝim alparolas al sia patrino, kiu estas forlasanta la domon ĉar ŝi estas malkontenta pro ke Haŝim apartigis ŝian nepon el lia amata ĉirkaŭaĵo en la vilaĝo :

“Kien vi iras patrino? Kion vi provas fari al mi? (...) Mi tion faris por lia bono. Kion mi farus? Kia estas mia kulpo pro kio mi ĝis la fino de mia vivo devos zorgi pri blinda infano? Kiam mi maljuniĝos, kiu zorgos pri mi? Kial via granda Dio ne helpas al mi saviĝi el tiu mizero? Kial mi sentu dankemon al Li? Ĉu pro tiuj aferoj, kiujn Li ne donis al mi? Ĉu pro mia mizero? Ĉu pro iu blinda infano? Ĉu pro mia edzino, kiu forpasis kaj forlasis nin? Mi dum kvin tutajn jarojn paciencis ! (...) Kiu helpas al mi? Kiu zorgos pri mi? Iru! Iru kien ajn vi volas!”

Ni vidas ribelon kontraŭ Dio kaj sorto en la vortoj de Haŝim. Sed ne nur tio. Li estas egoisma, solida. Tamen ŝi bedaŭras pri sia decido kaj revenigas sian



Mi pensas, ke la vivo mult-foje jam pruvis ke la ruzo pli bone efikas ol la perforto. Estas multaj historiaj, vere gravaj kaj memorindaj okazaĵoj, kiuj atestas tion, do, mi povas kun relativa certeco diri, ke tre ofte la artifikoj superas la armilojn!

La plej certa pruvo pri tio perdiĝas en la jarmiloj de la pasinteco, en la vere instruaj helenaj mitoj. Kaj mi diras tion, pensante pri la Troja Ĉevalo, kiun la Helenoj nomis kaj ĉiam nomas “Ligna Ĉevalo” (Δούρειος Ίππος) kaj ankaŭ la Latinoj “Equus Troianus”.

Ĉiuj homoj en la mondo, precipe tiuj kiuj apartenas al la tiel nomata okcidenta civilizacio, scias ion pri la afero de tiu “ĉevalo”, kiu, tamen, ĉi-tie ne meritas tute detalan rakontadon.



La tiama plej granda armeoforto de tiu mita mondo, la Unuo de ĉiuj helenaj ŝtatoj, militirinte kontraŭ Trojo, tre potenca nacio en la nordokcidenta Malgrandazio, estis okupinta

grandan parton de la troja lando, sed dum dek plenaj jaroj sieĝadis senrezulte la metropolon, kies falo donus la definitivon finon al la milito kaj certan baton, la totalan detruigo de la potenca kontraŭulo. Estis ne ordinara sieĝado; la Trojanoj, popolo militkapabla, fiera kaj sentima, ne limiĝis al la defendado de siaj provizoj kaj muregoj, ili entreprenis, preskaŭ ĉiutagajn sturmojn kaj atakojn kontraŭ la senlima kampadejo de la Helenoj kaj ties ŝipoj, tiele estis sencesaj bataloj, en kiuj falis tre multaj herooj el ambaŭ flankoj.

La genian ideon pri la fatala ĉevalo kaptis Odiseo (Ὀδυσσεύς), la reĝo de Itako (Ἰθάκη), unu el la pli grandaj estroj de la helena flanko, kiu distingiĝis ne nur per sia granda kuraĝo, forto kaj militlerteco, sed precipe per sia spriteco, kiu, en la plej krizaj momentoj de la milito, iĝis nevenkebla ruzeco kaj tute efika armilo. Kelkaj diradis, ke la ruzan ideon inspiris al Odiseo Atena (Αθηνά) mem, la diino kiu protekte staris ĉe la flanko de la Helenoj dum la tuta daŭro de la longa milito. Kompreneble tio ne estas certa, tamen oni povas diri kun certeco, ke estis ja la diino, tiu kiu montris al Odiseo la personon, la solan homon kiu kapablis efektivi la tre grandan, komplikan, vere

malfacilan projekton. Kai tiu persono estis tute senfama, tute ne distingita viro, estro de malmultenombra armeo el Focido (Φωκίς), kiu, per malgranda forto el 30 militŝipoj, partoprenis la tuthelenan militekspedicion. Lia nomo estis Epio kaj kvankam li estis filo de Penopeo (Πηνοπείδης), tre granda kaj fama en la tuta Helenujo malnova heroo, li estis homo tre modesta kaj eble ne nur hontema, sed ankaŭ iom timema, tute certe ne kapabla en la militaj aferoj. Tial, Epio ne partoprenis la grandajn batalojn, li ordinare servis kun siaj kunuloj la arieron de la batalantaj taĉmentoj. Pro ĉio tio ĉi li ne estis simpatia al la ceteraj militestroj, multaj el kiuj ne perdis okazon, ofte moki, ofendi kaj humiligi lin.

Tamen, Epio estis prudenta, pacama kaj modera, li tre bone sciis konservi sian memregecon, tiel, senproteste li akceptadis la mokojn kaj ironiaĵojn de la pli krudaj kaj sovaĝaj, tute maldelikataj kaj malafablaj militistoj.

Estas ja homoj, kiuj, per sia karaktero kaj ordinara konduto, montras sin senpovaj kaj senhelpaj, sed subite venas ilia signifa momento, tiu kiu ĉion renversas kaj malkovras personon kun nekonataj, nesupozeblaj povoj kaj kapabloj kaj kun mirindaj talentoj. La signifaj momentoj de la modesta, nefama Epio estis du. La unua estis, kiam la armeo, omaĝis al la falinta granda heroo Patroklo (Πάτροκλος), per brila solenado, en kiu estis ankaŭ programitaj atletaj konkursoj. Tiam, tute neatendite, Epio prezentis sin antaŭ la organiza komisiono kaj sciigis sian deziron partopreni la boksadon. Ĉiuj ĉeestantoj miris, kelkaj ridetis kaj aliaj moketis, tamen sur la boksareno staris iu brila Epio, kiu pruvis sian grandan talenton, venkinte sinsekve ĉiujn ŝiajn kontraŭulojn, inter kiuj estis kelkaj renomaj, fortaj kaj distingindaj militistoj.

La dua signifa momento de Epio venis, kiam Odiseo prezentis al la konsilio de la unuagradaj militestroj sian planon pri la definitiva konkerado de Trojo, kaj, inspirite de Atena, deklaris, ke la sola homo, kiu povus efektivi la ambician projekton estas Epio el Focido. En la komenco regis konfuzo, estis disputoj, miskomprenoj, miroj, duboj, tamen, kiam Epio estis invitita antaŭ la konsilio, estis konstatite, ke la modesta, nekonata viro estas tre bona kaj sperta arkitekto kaj brila inĝeniero. En nur unu momento Epio iĝis ĉefa kaj respektinda persono, majstro de la tuta armeo en tiu tre granda entrepreno. Centoj da elektitaj, fortaj kaj kapablaj viroj, komencis, sub lia gvidado kaj ordonoj, laboradi tagnokte, seninterrompe. Centoj da arboj estis dehakitaj, dekoj da



ĉarpentejoj, ŝnurfarejoj, forĝejoj kaj fandejoj estis instalitaj, tamen ĉio estis farata tute sekrete en bone



gardata malproksima loko, kiun povis atingi nek malamika, nek amika okulo.

Post kekla tempo, la grandioza, tute ligna konstruaĵo estis preta. Kaj tio estis kolosa ĉevalo, staranta sur grandegaj radoj. En la flankoj kaj la ventro de la ĉevalo estis nevideblaj de ekstere aperturoj, iaspecaj pordoj, pere de kiuj, helpe de ŝnurŝtupetaroj, oni povis eniĝi kaj eliĝi. En la vasta, taŭge aranĝita interno, la ventro de la ĉevalo, povis eniĝi kaj resti kaŝitaj, tute sekure kaj oportune, preskaŭ 100 militistoj kun sia armilaro, nutraĵoj kaj ĉio necesa. Do, en la kolosa kaŝejo eniĝis cent elektitaj de Odiseo mem militistoj, la plej batalemaj, militkapablaj, fortaj kaj temeraraj viroj, inter kiuj estis multaj renomaj, grandaj armeestroj. Kaj kun ĉiuj tiuj famaj, grandaj herooj, vera ĉefrolulo de la tuta entrepreno, estis Epio, la sola kiu povis manipuli la mekanismojn, precipe tiun per kiu fermiĝis kaj malfermiĝis la pordoj.

Unua celo de tiu ĉi mia rakontado estas tiu Epio, la nekonata, modesta, neforta viro, kiu dum dek jaroj restis nevidata, restante ĉiam en la ombro de la grandaj herooj de la troja dramo, sed subite li iĝis protagonisto de la lasta akto. La humila Epio, kompare kun la mond-konataj herooj, restas ĝis nun ne sufiĉe konata al la legantoj de la granda eposo, tamen lia faritaĵo restas senmorta simbolo de mistifikado. En la greka, eble ankaŭ en aliaj lingvoj, estas uzata la difino "Ligna Ĉevalo" kiel kvalifiko de objekto, ago, parolo, de ĉio, kio estas uzata kiel tromp-rimedo, kiel allogaĵo enkaŝanta ian ajn kaptilon.

Por iri al la dua celo de la rakontado, mi devas iom daŭrigi la historion pri la artificio de Odiseo. Do, en la ĉevalo eniĝis la elektitaj militistoj kaj unu nokton, centoj da Helenoj puŝrulis kaj lasis la kolosan ĉevalon kiel eble plej proksime al la portego de la troja murego. Post tio, ĉiuj Helenoj retiriĝis, ili tuj komencis malkonstrui siajn kampadejojn, transporti ĉion moveblan en la ŝipojn kaj bruligi ĉion ceteran. Poste, komencis la enŝipiĝo, kaj sekvis la iom-post-ioma deiro de la helena floto, granda parto de kiu restis

kaŝita malantaŭ proksima alta kabo, tute preta rapide reveni la ĝustan momenton. La Trojanoj, de malproksime kaj helpe de spionoj, dum kelkaj tagoj observadis atente tiujn neatenditajn movojn de la malamikoj, sed nur kiam la helenaj ŝipoj ne plu videbliĝis, ili kuraĝis eliri el la murego. Unue ili sendis batal-pretajn taĉmentojn al la forlasita, jam dezerta kampo de la detruitaj malamikaj fortresoj, barakoj kaj kampadejoj, por certiĝi pri la tuta foriro de la kontraŭuloj. Poste, la ĝenerala scivolo turniĝis al la stranga konstruaĵo, kiu estis lasita antaŭ la centra portego de ilia murego. Ili vidis, ke sur la ĉevalo estis gravurita la surskribo "Donaco de la Helenoj al Atena", kaj el tio multaj konkludis, ke la malamikoj foriris laŭ la volo de la diino, iamaniere montrita al ili. Estas kompreneble, ke regis precipe ĝenerala entuziasmo kaj neretenebla ĝojo, ĉar la fino de la kruela milito signis la elliberiĝon de la popolo el la longedaŭra, ne plu eltenebla malfeliĉo, kiun spertadis ĉiu troja vilaĝo, familio, persono. Multaj diradis, ke Trojo estis gajninta la favoron kaj protektadon de la granda diino, ke la grandioza ĉevalo estos por ĉiam la pruvo, la simbolo de tiu favoro, kiu fortimigos estontajn atakantojn.

Post longa diskutado, la supera reĝa konsilio de la princoj, armeestroj, nobeloj kaj ĉefpastroj, decidis permesi la transportadon de la dia donaco en la metropolon, sur la akropolon de la ĉefurbo. Kompreneble tio ne estis afero facila; centoj da viroj, dum kelkaj tagoj, penege, puŝante, tirante, uzante diversajn mekanismojn, sukcesis fari tion, kaj kiam ĉio estis plenumita, eksplodis la ĝenerala ĝojo, sekvis senfina festado kaj ĉio kio orfdinare akompanas tiajn feliĉajn okazaĵojn.

En tiu ĉi punkto prezentiĝas la dua celo de mia rakontado, Laokoono. Kaj tiu Laokoono estis divenisto kaj ĉefpastro en la plej granda sanktejo, dediĉita al la dio Apolono (Απόλλων). Li estis nobelo, parenco de la reĝa familio, kiel ano de la gento reĝanta super Trojo, kaj persono, kun sufiĉe granda influo sur multaj eminentaj Trojanoj. Tiu, do, Laokoono, ĉu puŝite de instinkto, ĉu de sekretaj diaj signoj, tute kontraste al la ĝenerala gajeco, vidinte la teruran ĉevalon sur la akropolo, ekscese koleris, tuj kolektis ĉirkaŭ si la plej fidelajn siajn amikojn kaj sekvantojn, sin prezentis antaŭ la regantoj kaj la senbride festanta homamaso kaj per sovaĝaj krioj, malbenoj kaj minacoj ne nur admonadis, sed postulis de la respondeculoj kaj la popolanoj tuj forigi de la urbo la malbenitan donacon de la Helenoj. Li klopodis konvinki ĉiujn, ke tiu monstra faritaĵo de la malamikoj kaŝas teruran danĝeron, ke ĝi estas trompo celanta la konkeron kaj detruon de la patrujo. Por prui ke li tute ne kredas al la dia elveno de la donaco, li levis kaj forte ĵetis pezan lancon



kontraŭ la ĉevalon. Tio kaŭzis la indignon de multaj ĉeestantoj, sed tia ago, ago de respektinda persono, sanktigita kaj patronata de Apolono, vekis la heziton kaj malkonfidon de aliaj personoj, kiuj kolektiĝis ĉirkaŭ Laokoono kaj komencis kune kun li brue protestadi. Regis kelk-momenta konfuzo kaj tumulto, tamen la amuziĝanta, elliberiĝinta el la longa timo kaj maltrankvilo homamaso, forpuŝis perforte la protestantajn partianojn de Laokoono, kiaj tiu lasta komprenis ke li povis fari nenion plu. Puŝata de la amaso, plengorĝe ekkris sian lastan averton: "Timu la Danaidojn ankaŭ kiam ili ofertas donacojn" ("Φοβού τους Δαναούς και δώρα φέροντας" / "Time Danaos et dona ferentes").

Akompanate de siaj samfamilianoj, amikoj, intimaj sekvantoj kaj sam-kredantoj Laokoono iris al apudmara, netegmentita altaro kaj helpe de siaj du filoj, komencis la ceremonion por solena sanktofero de taŭro omaĝe al la dio de la maro Pozidono (Ποσειδών). Tamen, la momenton kiam li levis la

ponardon, du grandegaj, monstraj serpentoj subite elfetiĝis el la maro, ili ĉirkaŭvolvis la tri virojn kaj ilin sufokis en la ĉeesto de pluraj personoj, kiuj mise komprenis ke tio estas pruvo, ke la dioj punis Laokoono pro lia kontraŭstaro, pro tio, ke, ĵetinte la lancon kontraŭ la ĉevalon, li ofendis Atenan.

Sekvis la konataj tragediataj okazintaĵoj, la perejo, la terura katastrofo, la totala neniigo de la troja nacio, tamen mi ne parolos ĉi-tie pri la detaloj de tiu senekzempla malfeliĉego. Tiu ĉi rakontado koncernas du personojn, du virojn, kiuj estis protagonistoj en neniu parolinda glorago, herooĵo, io ajn simila, tamen ili restas kaj restos senmortaj en la daŭro de la senfina mondirado. La unua ion faris, la dua ion diris kaj ĉio restas viva. La grandioza faritaĵo de la modesta boksisto, kiel mi jam diris, havas unikan signifon, ĝi estas la simbolo de la dole oferata donaco kiu ŝajnas sendanĝera, sed ĝi kaŝas malfeliĉon. La diraĵo de la pia pastro vivas ĉiam en la ordinara parolkontakto, kun la signifo: "ne konfidu viajn malamikojn eĉ kiam ili ofertas al vi ĉion ajn!".

Ne nur mia humila moŝto, sed multaj ĉiaspecaj grandaj artistoj de ĉiuj epokoj, el la tuta mondo, gloris miajn ĉi-tieajn heroojn per multaj, same senmortaj, unikaj verkoj. Ni admiras la artaĵojn sed tre ofte ni forgesas la simbolon de Epio, la admonon de Laokoono, kiu, en formo de asteroido (No 3240) rigardas nin de supre kun desapontiĝo!

-- el GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

Poemoj de Elena Popova

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

PATRA DOMO

Kvieta hejmonesto,
kie ni kune festas,
kie nin atendas
kun am' nia panjo.
Kaj ni sidas modeste
antaŭ la varma pano.
Estu por ĉiu homo
benita patra domo!

VIRINOJ

Ĉiuj el la virinoj,
kudrantaj, brodantaj,
laboremaj,
zorgemaj,
similas al floro.
le ĉiuhore,
iu ravita viro
al ŝi amsopiras.



desegnaĵoj de **Hori Jasuo** el Japanio



verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario

La Nova jaro renkontiĝis
kun tiu antaŭa
apud la historia pordo,
vidante ĝin lacegan,
pezantan sur la ŝultrojn de decembro
jam morta.
"Dank'al dio, tio ne okazis al mi,"
diris ĉekore la Nova Jaro,
dum vigla januaro ĉirkaŭpremis ĝin
forprenante ĝin foren.
Ili dancis kune la tutan nokton...
dum vere unuflanken sinkis
la pesilo
plenplena da vinbera suko,
tiel ke,
plenkonscie

februaro forŝtelis la lokon de januaro,
apude,
kaj marto kun la aliaj fratoj
sinsekve dancis kun ĝi
dum la finaj horoj.
Nu ĉi Jaro ekmalĝojoĝis
vidante ĉe la angulo
la figuron de l'plej maljuna
kiu revenis
por forpremi ankaŭ ĝin kun la aliaj
kiuj fine malaperis kiel la tago vespere.



poemo de **Clemente Zammit**
(maltano, elmigrinta en aŭstralion)

tradukita el la malta de **Carmel Mallia**

Patrino

verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

Javor estis revenonta de la laboro, kaj ŝi rapidis reordigi la fotojn en la albumo. Ŝi amis rigardi ilin, ili turnis sin al ŝia pasinteco. Memoroj, kiuj restas en via koro kaj neniu povas forpeli ilin de tie. Ekzistis belaj, ekzistis ankaŭ malĝojaj - karaj memoroj.

Jen la tuta familio: la filo kaj la filino, ŝi kaj ŝia edzo, "Dio indulgu lin," diris laŭte kaj krucsignis sin. Poste ŝi rigardis la alian kun siaj genepoj longan tempon. Ŝi tre amis ĝin. Ĝi estis ŝia amata. Eble estis ŝia plej proksima al la koro. Lazaro, ŝia edzo, Javor kaj Kalina, kaj ŝiaj genepoj, la infanoj de Kalina. Javor ne havis infanojn. Li havis familion, sed ili ne estis konvenaj unu al alia kaj disiĝis post kelkaj jaroj post la geedziĝo. Kaj Javor poste ne plu volis havi virinon ĉe si mem. Sed ŝia plej kara estis nigrablanka foto, kiu longe estis inter siaj personaj havaĵoj. Ĝi ne estis en la albumo. Ŝi enmetis ĝin tien, kiam ŝia edzo forlasis ĉi tiun mondon. Ne, ke li koleros kontraŭ ŝi, ne! Li estis tre bona kaj estis kompreninta ŝin. Sed ŝi ne volis ĉagreni lin, ŝi ne volis montri al li, ke ŝi faris la plej grandan oferon en sia vivo.

Sed ĉu ŝi oferis sian estontecon, sian feliĉan vivon?

Estis antaŭ sesdek jaroj, kaj ŝi estis juna, bela kaj enamiĝinta. Jes, en la viro de tiu ĉi foto. Kun ŝia amikino kaj studentino el eksterlando ili vivis kune, enamiĝinte kaj malenamiĝinte. Estis je la komenco de la semestro. Maria, ŝia amikino, malfruiĝis. Ŝi ne sendis sciigon la tutan someron. Ŝi maltrankviliĝis, kio povus okazi al ŝi, ke ŝi silentas? Sed ŝi venis kaj estis tre feliĉa. Ŝi montris al ŝi fianĉiĝan ringon. Marija diris al ŝi. ke renkontis lin ĉe la maro. Advokato kun oficejo

kaj bona praktiko. Ŝi enamiĝis. Por ĉiam. Li eĉ ne volis permesi al ŝi forveturi por fini sian studadon, kvankam ŝi havis nur unu semestron ĝis la fino .

La tempo rapide pasis. Ili disiĝis kaj ĉiu ekiris sian propran vojon. Ŝi al sia hejmurbo, Marija al sia estonta feliĉo. Ili skribis regule. Kiam Marija naskiĝis sian filon ŝi veturis vidi lin. Tiam ŝi renkontis la edzon de sia amikino. Bela, inteligenta, sindona al sia laboro kaj familio, sukcesanta viro. Ne pasis eĉ unu jaro kaj Marija denove gravediĝis. Ili atendis filinon. Ŝi ricevis novaĵon, ke filino jam naskiĝis. Sed ŝi ne iris vidi ŝin. Ŝi enamiĝis kaj ne volis disiĝi kun sia estonta fianĉo. Feliĉa, ŝi eĉ ne rimarkis, ke ŝia koramikino ne skribis kaj rakontis al ŝi pri sia filino, same kiel pri sia filo. La feliĉo veninta al ŝi tenis ŝin en alian vivon. Ŝi same atendis ricevi fianĉiĝintan ringon.

Sed ...

Ĉe la pordo iu sonis. Ŝi malfermis kaj mutiĝis. Antaŭ ŝi staris li, la edzo de Marija. Kun trista vizaĝo , profundaj kaviĝintaj okuloj . La rigardo lia ŝajne preterpasi ŝin sen avizo. Sur la maldekstra refaldo la nigra rubando senfortigis ŝiajn kruojn.

Ŝi ne invitis lin. Li mem eniris . Ili staris meze de la ĉambro, kaj la silento premis kaj frakasis ilin.

- Ŝi forpasis,- li diris surde. - Antaŭ unu monato. Mi ne povis savi ŝin. Ni restis solaj - konvulsioj skuis liajn ŝultrojn. La viro ne kaŝis siajn larmojn. Lia voĉo ekstremis.

Ŝi ne konsciis, kio okazas - ĉu tio estis malbela sonĝo, ĉu iu malbele ŝercas kun ŝi. Ŝiaj kruoj



senfortiĝis, kaj ŝi sidiĝis sur la sofon. En ŝiaj okuloj ne estis larmoj, nur ŝiaj manoj tremis, kvankam ŝi premis ilin reciproke. Aŭdis sian voĉon diri,

- Kiam? Kial?

- Post la naskiĝo ŝi ne levigis. Mi provis ĉion. Kaj la kuracistoj donis esperon, sed la plej malbono okazis. Ŝi jam ne estas ! Kaj infanoj ... Antaŭ ol forpasi, ŝi petis min sidiĝi apud ŝi, metis sian manon en la mian kaj petis min ĵuri, ke mi faros tion, kion ŝi diros al mi nun. - Lia voĉo ŝajne perdiĝis je ĉiu vorto dirita. Liaj larmoj enfluis laŭ la vangoj kaviĝintaj pro malĝojo.

"Alkonduku la infanojn por ke mi vidu ilin,"- diris ŝi per lasta peno.

Kalina estis en vindotukoj, kaj Javor apenaŭ ekpaŝis.

"Nun, diris Marija, mi petas vin, promesu al mi antaŭ ili kaj antaŭ mi, ke vi iros al Ingrid, mia kara

amikino. Vi konas ŝin, dekiam naskiĝis Javor. Ŝi vizitis nin ĉi tie. Vi petu, ke ŝi estiĝu via edzino kaj patrino de miaj infanoj. "- Ŝi diris tion, kaj ellasis lastan spiron. - Kaj jen mi estas ĉi tie - li falis sur la plankon apud la sofo.

Ne estis tempo por pensi. Ŝi ne ricevis engaĝiĝan ringon, eĉ ne diris adiaŭon. Ŝia geedziĝo estis la du orfoj, kiujn fidis al ŝi ŝia amikino. Ŝi ne ekvolis havi siajn proprajn infanojn, kvankam li insistis. Ŝi timis, ke nepovus dividi sian amon en du.

La ŝlosilo ekklakis en la klinko. Estis Javor.

- Panjo, mi estas ĉi tie. Mi aĉetis tion, kion vi ordonis. Ĉu vi bonfartas?

Ŝi rapide enmetis la albumon kaj viŝis la larmojn de sia vizaĝo. Ekridetis ŝi kaj stariĝis renkonti lin.

verkis kaj sendis **Ivaniĉka Maĝarova** el Bulgario

Blogo de klasifikanto

-- el la blaga blogo

En mia hejma kuirejo ni havas etan tirkestaron kun kvar tirkestoj por la manĝilaro.

Ĉe ni la ĉefaj manĝilaroj estas forko, tranĉilo



kaj kulero. Do, la unua tirkesto havas la forkojn, la dua la tranĉilojn kaj la tria la kulerojn. Tio klaras. En la kvara ni havas la kuleretojn. Tamen, kien ni metu la forketojn? Ni havas malmultajn kaj fakte ne tro ofte ni bezonas ilin, sed kompreneble ili ja rajtas havi sian propran lokon kaj

devas esti troveblaj okaze de neceso. Foje mi serĉas la forketojn en la kvara tirkesto kun la kuleretoj, tamen, mi mem ofte metas ilin en la tirkeston por la normalaj forkoj.

Ni analizu la aferon detale, ĉar la solvo ne facilas, tial ke ĝi baziĝas sur la jena demando: ĉu ni favoru la formon (forketoj kun forkoj), ĉu ni favoru la funkcion (pordesertaj manĝilaroj kune), ĉu ni favoru la grandecon (forketoj kun kuleretoj).

Fakte en alia pli granda tirkesto ni havas kune aliajn ilojn kiel kuleregoj, forkegoj kaj kuirejaj tranĉiloj. Kompreneble ili ne kunestas pro sia formo, nek pro sia grandeco, nek pro sia funkcio: la tranĉileto por senŝeligi terpomojn neniel kompareblas kun paro de forkego kaj kulerego, kiujn oni uzas por servi per manĝaĵo ĉetable. Do finfine ni alvenas al la kutima "pelmela tirkesto", kiu enhavas ĉion alian, kion ni ne

kapablis klasifiki taŭge.

Ĉiam ekzistas kriterio de

klasifikado, malgraŭ ke ne malofte oni ne konscias pri tio. Okazas ankaŭ, ke la kriterio malsamas laŭ la vidpunkto.

Diru al infano, ke balenoj kaj delfenoj ne estas fiŝoj. Li tutcerte rigardos vin, kvazaŭ vi estus granda sencerbulo.

Tiaj stultaj pensoj aperadas, kiam mi klopodas kompreni, kio estas mi por vi: ĉu mi estas nura amiko, aŭ porokaza amoranto, aŭ nur poŝtuko por sekigi viajn larmojn? Kian kriterion vi uzas por klasifiki min? Sincere dirite, mi jam supozas, ke ne temas pri grandeco aŭ formo, do eble temas pri funkcio. Do, kiu estas mia funkcio por vi? Ĉu mi estas kiel forketo, kiun vi ne scias kien meti? Plej certe mi devas iri al la jam menciita "pelmela tirkesto" kune kun aliaj kompatindaj ekskaj duon-amantoj viaj.

verkis **Viktoro SOLÉ** el Katalunio

Fonto: "La blaga blogo", revuo **Kontakto**, #273, 2016:3, p.18





Antaŭkonsideroj

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,



Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencan de la homaro, kaj ke la efektivigo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinarnaj homoj,

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Ŝtatoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, nun,

La Ĝenerala Asembleo,


Proklamas tiun ĉi Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu

organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la Ŝtatoj-Membroj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.



Artikolo 1

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencan, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco.



Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, haŭtkoloro, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Plie, neniu diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.



Artikolo 3

Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.



Artikolo 4

Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco; sklaveco kaj sklavkomerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.

(daŭrigota)

Ŝercoj



Edzino diras al sia edzo:

- Dimanĉe mi iros al preĝejo por pekkonfesi.

Edzo:

- Tre bone. Alportu ankaŭ sedativon... ĉar la pastro povos senti sin malbone!

Du amikoj paroladas:

- Kie mi povus trovi tian edzinon al kiun se mi dirus "saltu en la fajron!", ŝi saltus; "eniru en la akvon!", ŝi enirus; kaj kiam mi dirus "eniru en la lito!", ŝi tuj estus preta en la lito?

- Sed kial vi volus ŝin en via lito jam bruligita kaj malseka?!

Ĉe la flor-vendisto.

- Bonvolu, aĉeti rozojn por via edzino!

- Mi ne havas

edzinon.

- Tiam aĉetu

por via

fianĉino!

- Mi ankaŭ

ne havas

fianĉinon.

- Tiam aĉetu

por vi mem,

pro tio, ke vi

havas tian

trankvilan

vivon!...



Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj




HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Ingredienco de rizoto; 6. Dormus ____, se ĝi ĉason ne timus (Zamenhof); 7. Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj objektoj; 8. Met-rimojn ĉe la fino de versoj; 9. ____, via, ilia; 11. Unua silabo de gibono; 12. __ leporo, se ĝi ĉason ne timus; 14. Ondadis.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Kemian elementon kun la simbolo Ce; 2. Mallongigo de Eŭropa Parlamento; 3. Dankon ____ via respondo; 4. Orumus; 5. Alvokis, citis; 6. Naskiĝejo, patrujo; 10. Fajr-, flam-; 13. ____, ci, li.



Fonto: Semajno de Enigmoj #5


<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Pri nia movado

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Hispanio

Karaj amikoj. Bedaŭrinde la nia estas periferia, snobumata, ignorata movado. Se ni volas esti sub la lumo de la reflektoroj, ni devas pricerbumi ion, kiu magnet-altirus la atenton de la amasoj. Do, kiu estas la neeraripova, perfekta logaĵo?



La respondo estas: la naĝiloj kun kalkanumoj. Jes miaj karaj gefratoj. Bildigu al vi la scenon. Jen vi, morgaŭ, kiam vi iros al via laborloko, al la banko, al la oficejo, al la subĉiela bazaro, al kinejo, ĉien, kun viaj novaj, briletantaj naĝiloj kun kalkanumoj, la homoj miroplene ekrigardos al vi, kaj ili demandos: "Kial, Kial vi surmetas ĉi tiujn strangajn ŝuojn?" kaj vi malice respondos: "Ĉar mi estas Esperantisto!" Tiam la televidaj ĵurnaloj parolos pri ni, pri la nova modo kaj, konsekvence, pri Esperanto.



La scivolemo altirus multajn novajn lernantojn, kiuj volos kompreni la signifon, la sencon de niaj naĝiloj, tial intertempe ili ekstudos nian

amantan lingvon. Kaj kiam ili malkovros, ke tio estis utila kaptilo, ili ne koleriĝos, male, ili dankos nin.

Jen, jam mi povas senti la odoron de la fina venko! Mi estas certa, karaj samideanoj, ke vi aĉetos la naĝilojn kun kalkanumoj, kaj ke vi surmetos ilin, pro kaj por la amo de Esperanto !!!

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)
(daŭrigata)

Tatjana Ivanovna suspirante turnis sian pezan kapon sur la kuseno. Ŝi aŭdis sonori la dekunua horo ... kaj noktomezo... Plurfoje ŝi endormiĝis kaj vekigis. Ĉiufoje, ĝuste kiam ŝi ekis senkonsciiĝi, ŝi sonĝe ekvidis la domon en Karinovka, sed poste la bildo viŝiĝis; ŝi rapide refermis la okulojn por rekapti ĝin.

Ĉiufoje mankis iu detalo.

Foje la delikata flavkoloro de la ŝtono fariĝis ruĝa kiel sekiĝinta sango, aŭ la domo estis blinda, masonfermita, kun malaperintaj fenestroj. Tamen ŝi aŭdis la malfortan sonon de la frostitaj branĉoj de la abioj, skuitaj de la vento, kun ilia mallaŭta vitra tintado.

La sonĝo abrupte ŝanĝiĝis.

Ŝi vidis sin halti antaŭ malplena kaj malfermita domo. Estis aŭtuna tago, en la momento kiam la servistaro venis reŝanĝi la hejtfornojn.

Ŝi troviĝis malsupre, staranta kaj sola.

En la sonĝo, ŝi vidis la domon senhoma, la ĉambrojn malplenaj tiaj, kiaj ŝi estis ilin lasintaj, kun la tapiŝoj volvitaj laŭ la muroj.

Ŝi supreniris, kaj ĉiuj pordoj, pelitaj de la trablovo, batadis kun ĝema kaj stranga bruo.

Ŝi iris, rapidis kvazaŭ ŝi timus malfrui. Ŝi vidis la vicon de la vastegaj ĉambroj, ĉiuj malfermitaj, senmeblaj, kun pecoj da pakpapero kaj malnovaj gazetoj disaj sur la planko, kiujn levis la vento.

Finfine ŝi eniris en la ĉambron de la infanoj. Ĝi estis nuda kiel la aliaj, eĉ mankis la lito de Andreo; kaj en sia sonĝo ŝi sentis ioman konsternon.

Ŝi memoris, ke ŝi mem flankenmetis ĝin en angulon de l' ĉambro kaj volvis la matracojn.

Antaŭ la fenestro, sidante sur la planko, Jurij, pala, maldikiĝinta, en milita uniformo kiel la lastan tagon, ludis per malnovaj ostetoj, kiel li kutime faris en sia infanaĝo.

Ŝi sciis, ke li estas mortinta, kaj tamen, ekvidante lin, ŝi sentis eksterordinaran ĝojon, tiel ke ŝia maljuna elĉerpita koro ekbategis kun vigleco preskaŭ dolora. La obtuzaj kaj profundaj batoj frapis la parietojn de ŝia brusto.

Ŝi ankoraŭ havis la tempon vidi sin kuri al li, trairi la polvokovritan pargeton, kiu ĝemis sub ŝiaj paŝoj, kiel antaŭe, kaj ĝuste kiam ŝi estis lin tuŝonta, ŝi vekigis.



Estis malfrue. Tagiĝis.

Fino de la 8a Ĉapitro

Naŭa Ĉapitro

Ĝemante, ŝi vekigis kaj restis senmova sur la dorso, fikse rigardante la helajn fenestrojn.

Netravidebla blanka nebulo plenigis la korton kaj, al ŝiaj lacaj okuloj, tio aspektis kiel neĝo, tia kia ĝi falas la unuan fojon en aŭtuno : dika kaj blindiga, eliganta ian malviglan lumon, malfortan blankan brilon.

Ŝi kunigis la manojn kaj murmuris:

"Jen la unua neĝo..."

Ŝi longe rigardis ĝin kun rava esprimo, samtempe infana kaj iom timiga, eĉ freneza.

La apartamento estis silenta. Verŝajne ankoraŭ neniu revenis hejmen.

Ŝi stariĝis kaj vestis sin. Ŝi ne perdis la fenestrojn el la okuloj, imagante la neĝon, kiu falis, kiu striis la aeron kun fuĝanta rapideco, kiel birdaj plumoj.

Unu momenton, ŝi kredis aŭdi la bruon de pordo, kiun oni refermas.

Eble la Karinoj jam revenis kaj dormis.

Sed ŝi ne pensis pri ili. Ŝi kredis senti la neĝerojn frapeti ŝian vizaĝon, kun ilia gusto de glacio kaj fajro.

Ŝi ekprenis sian mantelon, rapide ligis sian ŝalon sur la kapon, pinglis ĝin ĉirkaŭ sian kolon, senkonscie serĉis sur la tablo, per etendita mano, kiel blindulo, la faskon da ŝlosiloj, kiun ŝi kunportis, estinte eliranta en Karinovka.

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

DUA PARTO - LA VIVO



66

Ke riveroj kaj maroj estas la reĝoj de ĉiuj riveretoj, okazas tial, ĉar ili bone povas teni sin malsupre.

Tial ili estas la reĝoj de ĉiuj riveretoj.

Tiel estas ankaŭ la saĝulo:

Se li volas stari super siaj homoj, li metas sin en siaj paroloj sub ilin.

Se li volas esti antaŭ ili,

li starigas sin kiel persono malantaŭe.

Tiel estas ankaŭ,

kiam la saĝulo restadas en la alto,

tiukaze la homoj ne estas ŝarĝataj de li.

Kiam li restadas en la plej alta rango,

li tamen ne ofendas la homojn

Tiel ankaŭ

la tuta mondo ne malvoleme metas lin antaŭen.

Kaj ĝi ne fariĝas malvolema.

Ĉar li ne kverelas,

neniu en la tuta mondo povas kvereli kun li.

Rimarkoj de Anniespera:

En la originalo, la vorto „zheng“ (fonetike) signifas „konkuri“, sed ne „kvereli“.

Vd. de Wang Chongfang:

„Kaj ĝuste ĉar Li ne konkuras kontraŭ aliaj,

Neniu sub la Ĉielo povas konkuri kontraŭ Li.“

Rimarkoj de Cezar

Ĉiu el ni konas tiajn nekonkuremajn homojn, ni ĉiuj tre ŝatas ilin. Kaj tamen nur malmultaj el ni agas tiel kiel ili. Sed kial? Kiu diablo nin rajdas? Kial ni kverelas ĉeokaze, kvankam ni scias, ke kvereloj estas tute sensencaj, ja eĉ kontraŭproduktivaj? Tion eble nur tre bona psikologo povus klarigi. Cetere, longtempe post Laocio ankaŭ Jesuo Kristo asertis, ke la lastaj estos la unuaj.

(daŭrigota)

5>>



patriron hejmen. Li reprenas sian filon de la ĉarpentisto.

Haŝim sentas ŝarĝon pro sia filo, kiam li prenas lin vole nevole reen al sia hejmo el la lernejo en Teherano pro la someraj ferioj. Li havas ankaŭ du filinojn, kiuj restas ĉe lia patrino. Kaj aliflanke, li volas edziĝi kun la najbara vidvino en la vilaĝo. Li kolektas monon kiel doto. Li prezentas donacojn al ŝia familio. Sed kun la morto de lia patrino, la familio pensas, ke ĉi tiu geedzeco ne alportos multan bonŝancon kaj sendos la tutan doton kaj la monon reen. Haŝim kolapsas.

En la fina sceno, la akvo en la rivero, kiu fluas kiel kolerego de Dio forprenas lian ĉevalon kaj filon. Li perdas ĉion.

La lumo, kiu aperas en la vizaĝo de lia mortanta patrino estas la sama kun la lumo, kiu aperas en la mano de lia filo, kies korpson li trovas ie en la marbordo. La lumo de Dio. Ili trovis Dion. Sed Haŝim restas en la soleco de la tero.

Dum kiam Mohamedo traserĉas palpante kaj

trovas la birdon falantan de sia nesto en la ĝardeno de la lernejo en Teherano kaj kiun remetas en ĝian neston, kiam la avino kolektas ovojn en la kokinejo kun siaj nepoj kaj la gekokaj plumoj flugas en la aero, kiam la eta Mohamedo kaj la avino promenas en la kamparo kaj ili kolektas florojn, kiam la avino post sia forlaso de la domo ŝi savas fiŝon el la koto kaj remetas ĝin en la rivero ktp en ĉio ĉi ni atestas poeziajn imagojn. La imago pri voĉo ankaŭ havas malsamajn efikojn sur la aŭda percepto de li kaj lia patro. Mohamedo estas sentema kaj admiranta pri la sonoj de birdoj kaj la sonoj de naturo. Kontraŭe Haŝim konsterniĝas pro la sono de lupo en la arbaro, kiun li foje aŭdas. Kvazaŭ li ne estas sentema al iu alia bela sono en sia vivo.

En la fina sceno kiam Haŝim ne savas la dorsoalteren turniĝantan testudon prezentas tute kontraŭan portreton al lia filo kaj patrino. Ni pensas pri la konceptoj de vivo kontraŭ morto, altruismo kontraŭ egoismo.

La direktoro Meĝid Meĝidi ankaŭ en sia junaĝo perdis sian patron. Eble tio estas la kialo, ke li rakontas en tia sentimentala maniero la rilatoj pri parto kaj filo. Plue oni diras ke en sia junaĝo kiam li studis en la teatra fako li spertiĝis en la direktado de infanoj. Muhsin Ramazani kiu rolis kiel Mohamedo estis vere blinda. Meĝid perfekte kaj lerte kaj tre sentimentale direktis ĉiujn geknabojn en la filmo. Oni ankaŭ taksas la iran kinon kun la natureco kaj sukceso de la infanaj geaktoroj.

Ankaŭ ĉiuj aliaj geaktoroj rolis tre nature kaj

sukcese en la filmo. Plue tiujn scenojn, kiuj povus fariĝi melodramecaj, li direktis kaj ekspoziciis en simpla maniero, tamen eĉ se tiel, ni ne povas teni niajn larmojn.

Spektante tiun filmon onia koro pleniĝas kun sentemo pri beleco kaj oni kredas je tiu filmo. La filmo de Mediĝi, kiun li farbis kun sinsereco kaj tiel priskribis la vojon al la "Koloro de Dio" estas vra pentraĵo. Eĉ la plej amaraj scenoj de la filmo ne frogestigas la belecon de tiu bela pentraĵo.

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

Franco KAFKO (Franz Kafka) *
La transformiĝo (parto 1)



I
Kiam Gregoro Samsio iun matenon el maltrankvilaj sonĝoj vekigis, li trovis sin en sia lito transformita al monstra fiinsekto. Li kuŝis sur sia karapace malmola dorso kaj vidis, kiam li levetis la kapon, sian volbitan, brunan, per arkecaj rigidiloj dividitan ventron, sur kies

alto la litkovrilo, preta al kompleta malsuprenĝlito, apenaŭ povis sin teni. Liaj multaj kompare kun lia cetera amplekso kompatinde maldikaj gamboj flirtis konfuze antaŭ liaj okuloj.

"Kio okazis al mi?" li pensis. Tio ne estis sonĝo. Lia ĉambro, vera, nur iom tro malgranda homĉambro, kuŝis trankvile inter la kvar vandoj al li bone konataj. Super la tablo, sur kiu estis sternita specimenaro de dise elpakitaj drapaĵoj - Samsio estis vojaĝkomizo - pendis la bildo, kiun li antaŭ nelonge estis eltondinta el ilustrita revuo kaj metinta en beletan, orumitan kadron. Ĝi prezentis sinjorinon kiu, provizita per peltĉapelo kaj peltboao, sidis rekte kaj levis al la spektanto pezan peltmufon, en kiu ŝia tuta antaŭbrako malaperis.

La rigardo de Gregoro poste direktiĝis al la fenestro, kaj la malserena vetero - oni aŭdis pluvgutojn surfrapi la fenestroladon - igis lin tute melankolia. "Kiel, se mi ankoraŭ iom plue dormus kaj ĉiujn stultaĵojn forgesus", pensis li, sed tio estis tute ne realigebla, ĉar li kutimis dormi sur la dekstra flanko, sed en sia nuna stato ne povis sin movi en tiun pozicion. Kun kiom ajn da forto li sin ĵetis al la dekstra flanko, ĉiam denove li rebalanciĝis en la dorsan pozicion. Li provis tion ja centfoje, fermis la okulojn por ne suferi la vidon al la baraktantaj gamboj, kaj

¹ **Hŭajah Ŝams al-Din Muhammad Hafez-e Ŝirazi**
(خواجہ شمس‌الدین محمد حافظ شیرازی en la Persa lingvo, konata laŭ sia plumnomo Hafez (حافظ Hāfez) aŭ Hafizo nask. en Ŝirazo inter 1310 kaj 1337 kaj plej verŝajne vivanta en 1325/26–1389/90), estis mistika persa poeto, kiu "laŭdis la ĝuojn de amo kaj vino sed celis ankaŭ religian hipokriton".

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo
26 januaro 2019, Büyükkada, Istanbulo

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

rezignis nur kiam li flanke eksentis neniam antaŭe sentitan, malgravan, obtuzan doloron.

"A=C4? dio," pensis li, "kiom streĉan profesion mi elektis! Tagon post tago vojaĝe. La komercaj zorgoj estas multe pli grandaj ol en la hejma komercejo, kaj krome mi estas ŝarĝata per tiu plago: la vojaĝado, la zorgoj pri la trajnkonektoj, la malregulaj, malbonaj manĝoj, homaj rilatoj ĉiam ŝanĝiĝantaj, neniam daŭraj, neniam koreciĝantaj. La diablo prenu ĉion ĉi!" Li sentis malfortan jukon supre sur la ventro; ŝovis sin sur la dorso malrapide pli proksimen al la litfosto por ke li pli bone povu levi la kapon; trovis la jukejon, kiu estis tute garnita per malgrandaj blankaj punktetoj, kiujn li ne sciis prijuĝi; kaj volis per unu gambo pripalpi tiun ejon, sed tuj ĝin retiris, ĉar ĉe la tuŝo lin priblovigis frostotremoj.

Li reglitis en sian antaŭan pozicion. "Tiu frua ellitiĝo", pensis li, "tute frenezigas". La homo devas havi sian dormon. Aliaj vojaĝantoj vivas kiel haremulinoj. Kiam mi por ekzemplo antaŭtagmeze reiras en la gastejon por transskribi la atingitajn mendojn, tiuj moŝtoj sidas ankoraŭ ĉe la matenmanĝo. Tion mi provu ĉe mia ĉefo; li elĵetus min tuj. Kiu scias cetere, ĉu tio ne estus tre bona por mi. Se mi ne retenus min pro miaj gepatroj, mi jam antaŭ delonge maldungus min, irus antaŭ la ĉefon kaj dirus al li mian opinion el la fundo de mia koro. Li falintus de sia pupitro! Estas ja ankaŭ stranga maniero, eksidi sur pupitro kaj paroli desupre kun la dungito, kiu krome, pro la malbonaŭdeco de la ĉefo, devas alpaŝi tute proksimen. Nu, la esperon mi ankoraŭ ne tute perdis; kiam mi nur havos iam sufiĉe da mono por repagi al li la ŝuldon de la gepatroj - tio daŭros certe ankoraŭ kvin ĝis ses jarojn - la aferon mi nepre faros. tiam oni vere turnos la paĝon. Sed dume mi devas min levi, ĉar mia trajno iros je la kvina."

Kaj li rigardis transen al la vekhorloĝo, kiu tiktakis sur la ŝranko. "Ĉiela patro!" pensis li. Estis la sesa



horo kaj duono, kaj la montriloj trankvile antaŭeniĝis, estis eĉ jam post duono, proksimiĝis jam al tri kvaronoj. Ĉu la vekilo eble ne sonoris? Oni vidis de la lito, ke ĝi estis ĝuste programita por la kvara horo; certe ĝi ankaŭ sonoris. Jes, sed ĉu eblis trankvile preterdormi tiun mebluskuan sonoradon? Nu, trankvile li ja ne dormis, sed verŝajne des pli profunde. Sed kion fari nun? La venonta trajno iros je la sepa horo, pro tiun atingi li devus freneze rapidi, kaj la specimenaro ankoraŭ ne estis enpakita, kaj li mem sentis sin tute ne aparte freŝa kaj moviĝema. Kaj eĉ se li atingus la trajnon, neeviteble venos fulmotondro de la ĉefo, ĉar la komerca servisto atendis ĉe la kvinhora trajno kaj delonge raportis pri lia manko. Li estis kreaĵo de la ĉefo, senspina kaj sensprita. Kiel, se li anoncus sin malsana? Sed tio estus ekstreme embarasa kaj suspektiga, tial ke dum sia kvinjara servo Gregoro eĉ ne unu fojon estis malsana. Certe la ĉefo venus kun la asekura kuracisto, farus riproĉojn al la gepatroj pro ilia mallaborema filo kaj tranĉus ĉiujn kontraŭdirojn per atentigo pri la asekura kuracisto, por kiu ekzistas ja entute nur homoj sanegaj, sed mallaboremaj. Kaj ĉu cetere li tiukaze estus tute malprava? Fakte Gregoro sentis sin tute bonfarta, nekonsidere vere superfluan dormemon post tiu longa dormo, kaj havis eĉ aparte fortan malsaton.

Kiam li ĉion ĉi urĝege pripensis, sen ke li povis sin decidi al ellitiĝo - ĝuste tiam la vekilo sonis kvaronon antaŭ la sepa - oni sinretene frapetis je la pordo ĉe la kapoparto de la lito. "Gregoro", oni vokis, - estis la patrino -, "estas kvarono antaŭ la sepa. Ĉu vi ne volis forveturi?" Tiu milda voĉo! Gregoro ektimis, kiam li aŭdis sian respondan voĉon, kiu ja evidente estis lia antaŭa, sed en kiun, kvazaŭ desube, miksiĝis nesubpremebla, doloriga pepado, kiu lasis la klarecon al la vortoj efektive nur en la unua momento, por ilin poste tiom detruui, ke oni ne sciis, ĉu oni estis ĝuste aŭdinta. Gregoro volis detale respondi kaj ĉion klarigi, sed ĉe tiuj kondiĉoj li limigis sin je la vortoj: "Jes ja, dankon panjo, mi jam ellitiĝas." Pro la ligna pordo la ŝanĝo en la Gregora voĉo estis ekstere verŝajne ne sentebla, ĉar la patrino trankviliĝis per tiu deklaro kaj forpantoflis. Sed per tiu paroladeto la aliaj familianoj estis atentigitaj pri tio, ke Gregoro kontraŭ atendo ankoraŭ estis hejme, kaj jam frapis je flankpordo la patro, malforte, sed per la pugno. "Gregoro, Gregoro", vokis li, "kio do estas al vi?" Kaj post iometo li admonis refoje per pli basa voĉo: "Gregoro! Gregoro!" Sed ĉe la alia flankpordo mallaŭte plendis la fratino: "Gregoro? Ĉu vi ne fartas bone? Ĉu vi bezonas ion?" al ambaŭ flankoj Gregoro respondis: "Jam preta", kaj per plej zorga elparolado kaj per enŝovo de longaj paŭzoj inter la unuopajn vortojn, klopodis forpreni de

sia voĉo ĉion rimarkindan. La patro ja efektive reiris al sia matenmanĝo, sed la fratino flustris: "Gregoro, malfermu, mi petegas vin." Sed Gregoro eĉ ne pensis malfermi, sed laŭdis la prudenton vojaĝe akiritan, ankaŭ hejme rigli ĉiujn pordojn dumnokte.

Unue li volis ellitiĝi trankvile kaj neĝenate, sin vesti kaj antaŭ ĉio matenmanĝi, kaj nur poste pripensi ĉion ceteran, ĉar, tion li ja sentis, enlite li ne atingus saĝan finon de sia pripensado. Li memoris, ke li jam plurfoje en la lito estis sentinta ian doloretan eble pro mallerta kuŝado estiĝintan, kiu poste ĉe la ellitiĝo montriĝis pura fantazio, kaj li estis streĉe sciema, kiel liaj hodiaŭaj fantaziaĵoj iom post iom dissolviĝos. Ke la voĉa ŝanĝiĝo estis nenio alia ol antaŭsigno de plenfrapa malvarmumo, metia malsano de la vojaĝistoj, pri tio li eĉ ne iomete dubis.

Deĵeti la kovrilon estis tute simple; li bezonis nur iom sin ŝvelblovi kaj ĝi falis per si mem. Sed plue fariĝis malfacile, precipe tial ke li estis tiom eksterordinare larĝa. Li bezonus manojn kaj piedojn por starigi sin; sed anstataŭ tion li havis nur la multajn gambetojn, kiuj seninterrompe estis plej diverse moviĝantaj kaj kiujn li krome ne regis. Se li volis foje iun fleksi, tiam ĝi unue sin streĉis; kaj se fine li sukcesis per tiu gambo realigi, kion li volis, tiam intertempe ĉiuj aliaj laboris, kvazaŭ liberigite, en plej alta, dolora ekscito. "Nur ne resti senutile en la lito", diris Gregoro al si.

Unue li volis eliĝi el la lito per la malsupra parto de sia korpo, sed tiu malsupra parto, kiun li cetere ankoraŭ ne estis vidinta kaj pri kiu li ankaŭ ne povis ion konkretan imagi, montriĝis tro malfacile movebla; tio iris tiel malrapide; kaj kiam li fine, preskaŭ furioze, kun kolektita forto, senkonsidere sin antaŭen puŝis, li maĝuste elektis la direkton, li fortege frapiĝis kontraŭ la malsupra litfosto, kaj la arda doloro, kiun li sentis, komprenigis al li, ke ĝuste la malsupra parto de lia korpo estis en la momento eble la plej delikata.

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>

* *Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kirling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.*

Miĥael Giŝpling

En 2008 la poemciklo *Rekviemo de Miĥael Giŝpling*

rivevis la unuan premion ĉe Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi estis la kvina premio, kiun li gajnis ĉe tiuj Konkursoj ekde la jaro 2000. Estas rimarkinde, ke la poeto jam tiam estis en siaj okdekaj jaroj.



Miĥael Giŝpling naskiĝis en 1924 en Irkutsk, el juda deveno. Li loĝis en Ruslando ĝis 1998, kiam li transloĝiĝis al Israelo. Profesie li laboris kiel inĝenierokemiisto. Li ekstudis Esperanton en Moskvo en 1943 kaj estis aktiva membro de la moskva Esperanto-klubo Fajrero, kiam renaskiĝis la Esperanto-movado en Sovetio en la 1950-aj jaroj. Sed iam en la 1960-aj jaroj li forlasis la movadon kaj sekve malmulton rilatis kun la esperantistoj. Post tiu periodo li komencis aktivi kiel poeto en la lingvo, unue per esperantigo de ruslingvaj poemoj, sed baldaŭ poste originale kiel serioza poeto en Esperanto. Liaj poemoj komencis aperi en Esperanto-revuoj kaj en 1994 Flandra Esperanto-Ligo eldonis lian unuan poemaron, *El sisma koro*. En ĝi aperis jam matura, vivo-sperta poeto, kiu verkis pens-provoke pri la vivo en la post-sovetia medio. En la longa poemo *La Infero* li priskribas la vivon de la Rusoj: "Tamen la mondfama Dante / Estis sola ekskursano / En la regno de Satano / Kie loĝas mi konstante." La libro vekis atenton, inter alie pro ĝiaj klasikaj normoj de rimoj kaj ritmo, okaze tamen kun frapanta freŝeco. Post lia transloĝigo al Israelo, al Jerusalemo, sekvis pliaj poemaroj: *Eola harpo*, 1999, *Tie ĉi tie*, 2003 kaj *Vespere*, 2008. En 2007 aperis ankaŭ kelkaj poemoj liaj en Moskvaj sonoriloj, antologio de verkoj de moskvaj esperanto-poetoj. En preparo estas elektoj el ĉiuj poemaroj sub la titolo *Ĉeneroj*.

La poemoj de Miĥael Giŝpling havas tiun aŭtentan karakteron, kiu meritas fidon kaj atenton de legantoj. Liaj versoj estas rimitaj kvazaŭ nenio estas pli natura, tiel li sekvas tradicion, kiu ne devas elvoki miron, sed postulas agnoskon de la poeta celo, kiu ĉiam estas proksima, palpebla, moderna. Li ne klopodas rompiĝi el la tradicioj kaj konvencioj per eksperimentaj formoj

kaj stiloj, li ne estas modernisma poeto. Sed li estas moderna en la senco, ke lia poezio rilatas al tio, kio estas okazanta, ĉu en eksteraj cirkonstancoj, ĉu en aktualaj personaj sentoj kaj pensoj. Sian modernecon li atingas per aŭtentika simpleco, fortaj rimoj kaj vorta muziko. Poetoj havas la rajton elekti sian rimedojn, ĉu temajn kaj formajn, por konservi la intiman rilaton inter sia animo kaj sia persona esprimado. Aŭ kiel diras Giŝpling mem: "Mi devas diri puran veron / sed lingvon, stilon, manieron / elektu ĉiu al si mem." Giŝpling faras precize tion: li esprimas sian modernecon per rimedoj delonge pruvitaj taŭgaj en la manoj de serioza poeto, "se ĝin disponas lerta man'", kiel li ankaŭ diras.

En sian poezion Giŝpling kolektis siajn spertojn el kiuj li ellaboris memorindajn bildojn respegulantajn observojn, sentojn kaj pensojn, kiuj okupis lin daŭre aŭ sporade dum lia longa vivo. Lia persona ĉeesto estas ĉiam evidenta: "La koro volas memesprimon", li diras. Tiu memesprimado tamen lasas foje la poeton malkontenta, sed tiam instigas lin al ĉiam novaj provoj. En poemo titolita *Mortontaj* estas ni ... li komparas la "Kreanton", kiu estas daŭre malkontenta pri la homo, sia kreaĵo, kun la poeto, kiu "plibonigante ĉiam sian kanton / forĵetas ĝin, la pecojn de malnet' / por tuj ekkrei novan varianton." La poeto estas la vera artisto, la vera kreanto.

Mi menciis komence la poemciklon *Rekviemo*. Ĝia temo estas la morto de la edzino de la poeto. Legante tiujn poemojn oni sentas la emocian potencon de la komunikado de la poeto de sia anima doloro. Li sukcesas esprimi sian suferon, sian korŝiran perdosenton per disciplinaj versformoj, kiuj firme ĉirkaŭtenas la sentoplenan enhavon. Kaj tia estas la metodo de Miĥael Giŝpling: li komunikas siajn spertojn sincere, plenagorde kun siaj sentoj kaj opinioj, sen evidentaj inklinoj al modernismaj tendencoj. Jen unu el la poemoj de *Rekviemo*:

*Ĝis la fortoj vin perfidis,
ĝis vi sinkis en la svenon,
vi el via lito vidis
tra l' fenestro la ĝardenon.
Inter branĉoj nigris nesto,
kaj floranta verda frondo
balanciĝis ĉe l' fenestro
allogante al la mondo.
Vi rigardis, kiel pompis
kaj alvokis la somero...
Ĝi nur trompis, dolĉe trompis,
ĉar ne restis jam espero.*

Fluis via tempo lasta,
floris arboj en la korto,
kaj turmentis la kontrasto
de la vivo kaj de l' morto.

(Juna amiko, aprilo 2013)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/gispling.html>

de Baldur Ragnarsson

Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Tutmonda narcisismo

Ni vivas en mondo kie ĉiuj
enamiĝas al sia ekstera aspekto
kia koloro estas ties okulo kaj
vizaĝo
kaj ĉu ili estas fascinaj?!

Ni konas nian aspekton je ĉiu
detalo
laŭ ties formo kaj koloro
Ĉu ni aspektas pli aĝa aŭ pli juna
Demandu pri tio laciĝintajn
spegulojn.

Ni konas ĉiun falton de vizaĝo,
ni sentas doloron pro perditaj haroj,
pro ĉiu ŝanĝo tutan nokton ni ne
dormas
tio vivon nian igas malfeliĉa.

Kiom da mono elspeziĝas, kiu
scias
por iu ajn kremo aŭ kosmetikaĵo,
por operacioj neniu ŝparas
de vizaĝpartoj aŭ plasta mamoo.

Spiritaj malbelaĵoj apenaŭ
okulfrapas
tiel niajn malbonojn ni kovras,
profunde ĉe ni ili sin kaŝas
kaj nur por eksteraĵoj ni pensas.

Ni ege zorgas pri nia aspekto,
Ĉion ni havas en nia memoro,
pri nia interna mondo ni nenion
faras,
fakte ni lasis tion perdita.

Tirana, 30-an de aŭgusto 2017

Rideto

Kiom facile rideti estas
Malfermeti buŝon sufiĉas
Vangostoj suprenmovas

viaj okuloj radiobrilas
energio el koro fontas
kiom facile rideti estas

Rideto- plej bela rozo
de ĉiuj amoj
rideto- produktita de boneco
rideto- patrina amo
rideto- patra feliĉeco
rideto- nur kora donaco
rideto- plej bela rozo
de ĉiuj amoj

Ĝin donacante pli riĉaj ni fariĝas
Sed kial do ni tiel rare tion faras

Kial tiel kare tion ni vendas?!
Ni turnis ĝin simple al varo
En kiu maro do dronis la rideto
Tiu varma donanta nur bonecon?!

Kial ĝin anstataŭas malpura
grimaco
Kiam ni ĝin fordonas pli riĉaj
fariĝas.

Aŭ kiel varo dum vendo kaj aĉeto
por servilismo ĝi uziĝas
Ĉu turniĝis al lupoo-intereso?!
pli ofte ĝi uziĝas por mokado, ironio
plurestas forgesita povra amo

Se rideton, tiun belan, noblan
la homaro forgesos
tiam ni povas diri sentime
definitive animala mondo venkos.

Tirana, 07.10.2017

Vojaĝo per vespera trajno

Skuiĝas ni pro trajna
balancado
kaj sentigxas vespera spirado
dum oni rigardas en senfinaj
agrokampoj
kiel laboras ankoraŭ virinoj.

Pro ilia peza laboro
mem naturo ofendiĝas
pro ilia vizaĝo nostalgias
eĉ la forlasita spegulo.


Ke ili bezonas ripozu
Ĉu oni forgesis
ke inoj krom laboro bezonu
iom da tempo por sin beligi.

Enhavante virinan penon
eĉ plej bela pejzaĝo enmonde
perdas sian brilon, ĉiun valoron
kaj vana iĝas tio sence.

Aŭdi ĉirkaŭen ie ajn
kia tristeco kaj humilo en vivo estas
ke pezan laboron en agrikulturo
Ja virinoj kaj virbovoj faras.

Longajn paroladojn kompilas
la regantoj en la ĉefurbo
pri emancipiĝo kaj virinoj
dum iliaj edzinoj en vera lukso
vivas!

Lushnjë, julie 1985



**“Proponi Trankvilan Morton”
Kiel ni renkontas nian lastan momenton?**

de Dr. Isitobi Kozoŭ

(Kobe ĵurnalo 2019/06/10 08/26:
vespera ĵurnalo, ĉiu sabato)

Dr. Isitobi Kozoŭ naskiĝis en la jaro 1935 en gubernio Hiroŝima, Japanio. En la jaro 2005, li konvertis de la Tokjo Saiseikai Centra Hospitalo kiel kirurga doktoro al la speciala maljuna protektaĵo “Aŝihana Kadukulejo” (Setagaja, Tokjo) kiel regula doktoro. En la jaro 2005, li proponis la trankvilan morton. Poste, li kontinue ekspedas la meriton per diversaj rimedoj de la kadukulejo.

Mi deziras proponi trankvilan morton kiel la ideala rimedo por la fino de la vivo.

(daŭrigata)

7 Se la paciento spiregus, ne konfuziĝu!

Gepatroj certe malsupreniras deklivon. kiam ili maljuniĝas. Multfoje konkuranto sentas, ke maljunulo proksimiĝas grade al sian lastan stadion. La kvanto de manĝaĵo malmultiĝas je la maljunulo, kaj malgrasiĝas. Iam oni sentas ke la maljunulo iras ekstreme malsupren. Konkuranto interkomunikas de koro al koro. La proksimiĝo al la trankvilan morton povas koni de la malvarma piedo. Ĉar sufiĉa sango ne estas atingebla en la plej fora distanco de koro pro la hipotensio. En la lasta periodo, oni spiregas. La kialo estas manko de sango en la mjelbulbo kie estas spira centro, kio estas la plej grava por teni vivon. Tiam la paciento ne havas senton, ĉar oksigeno ne atingas al la cerebro. Do la akompanantoj ne devas konsterni jene, “La spiro ŝajnas malfacila.” “Ŝajnas esti kompatinda!” “Devas fari ion!” Kuracisto devas informi detale al la familianoj pri tiu aferoj. Ĉiu paciento iros iam sur la vojo renkonti kun la forpasinta persono, kion la koncernato ankaŭ esperas. Se la forpasanta persono jene pensus, la akompananta familianoj ankaŭ povus elteni. En la okazo oni pensas jene, “Ŝajnas dolori”, “Ĉu forlasi estas bone?” Oni ne povas sidi nek stari, kaj vokemas ambulancan. Simile por la demencaj gepatroj estas grave sidi tuj proksime. Pro la encefalopatio, pacientoj falis en plenan kaoson, sed ili havas fieron. Do ni ne devas koleri dirante jene, “Animfirmiĝu!” Kiam ili estas

persekutita en senelirejon, ili povus rifuĝi prizorgadon aŭ fari problemon. Kaj unu la alia falus en prizorgadan inferon. Estas plej bone sidi tuj proksime, akcepti, kaj kunkuri.



8 La merithava laboro pensi vivon kaj morton

En la speciala maljuna protektaĵo kie mi laboras, multaj personoj praktikas profesiojn. Ĉiuj pensas kiel ili devas sinoferi por la eniruloj en la lasta stadio. Kiam mi konvertis el kirurgo de hospitalo, mi sentis ke la funkciuloj estas sinoferema. Mi demandis al ili, “Kion vi pensas kiam vi okazigis misgluton al enirulon pro plua bonintenca manĝoservo?” Mi supozis ke ili respondos, “Ba! Kion la familianoj diros al mi? Ĉu la superuloj turmentos min?” Sed ili respondis, “Mi turmentas mem.” Dum kirurgulo, mi konduktemis indiferece kvazaŭ mi estus superulo. Tra la konversacioj, mi sentis ke mia koro estis lavita kaj ke mi povos fari bonan laboron kun tiaj sinceraj personoj.

Mia koro kunsentis la paroladon de Sakai Juusai, eminenta bonzo de tiantajano. Li estis en la bazo de korpeŝturma trupo je la militfino, foje ŝanĝis sian laboron post milito. Post siaj kontinuaj malsukcesoj, li fariĝis bonzo kaj du foje kompletis la severegan “militagajn asketismon sur montkresto.” Li ricevis la honoran titolon “granda aĉarĵo.” Li diras, “Estas pli grava la enhavo ol la longeco de sia vivo” “Estu maltenaca kun sia sentimento,” “Ne estu tro detalema, aŭ la grava materialo estus nebula,” kaj “Pensu ke oni estas vivata en vasta naturo kaj ne forgesu danki tion, kaj oni povus vivi trankvile.”

Mi unue pensis reveni al medicina instalaĵo post trijaraj laborado en la kadukulejo, sed jam baldaŭ 14 jaroj pasis. Mi ne povis retiri min de la laborejo vidante ĉies sinceran konduton al la terminala stadio, kaj pensante la gravecon de la merithava laboro pri vivo kaj morto.

(daŭrigota)

tradukis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

Super la domo, kie la junuloj interparolis, la atmosfero estis maltrankvila. Flugatakoj skuadis la urbon.

– Ili komencas denove. Ne gravas! Kaj kiel estis poste?

– Nu vi scias, ni estis tute junaj, preskaŭ nur buboj, tuj post la abiturienta ekzameno. Viglaj kaj ludemaj. Hundoj sen pripensoj kaj sen respondeco. Ni promenis en la granda urbo, kiun ni ne konis, kaj kien ni alvenis la saman tagon. Subite ni eksentis la bezonon por nova societo. Mia amiko proponis, ke ni alparolu po unu knabino sur la strato, sed mi riproĉis lin pro absoluta manko de vera aventuremo. Alparoli knabinon surstrate, kia banalaĵo! Sed mi diris al li: "Nun ni vizitos familion kaj interkoniĝos kun la ĉarma filino de la domo". Mia amiko faris ŝvebajn gestojn ĉirkaŭ sia tempio kaj grimacis demande. Li diris ke mi tiel ade praktikas la idioecon, kvazaŭ mi estus profesia idioto, idiotisto. Ni same ne konas tiun ĉi urbon, kiel Kuvajton. Mi demandis, kio estas Kuvajto. Li diris, ke ĝi estas urbo ĉe la Persa Golfo. "Vi volas fanfaroni pri via scio", mi diris, "sed vi havas malpli da fantazio ol virga pediko. Mi montros al vi, ke ni vizitos hodiaŭ familion en tiu ĉi urbo". Li rimarkis, ke mi jam havas planon, kaj iĝis pli respektema al mi. Li ne montris tion ankoraŭ; li bruis kaj insultis min laŭ la stilo de knabaĉoj, sed kun kreskanta admiro. Li argumentis, ke ni ne povas scii en kiuj familioj estas belaj knabinoj, kaj sekve la tuta afero estas stultaĵo. Sed mi insistis, ke ne gravas. Ni ja povas provi la bonŝancon kaj li ne timu: mi aranĝos la reston. Mi havas ja pli da fantazio ol abiturienta pediko. Mi efektive posedis fantazion en abundo. Mi volis uzi la recepton de la detektivromanoj kaj iri ien, kie ni rolos kiel kontrolantoj de la akvomezura instituto, kaj se ni havos bonŝancon, ni komencos agrablan interrilaton kun iu el la troveblaj virinoj. Sed pri tio mi ne parolis. Ni vetis. Mia tasko estis eniri en fremdan loĝejon kaj pasigi tie kvaronhoron kaj adiaŭi en plena amikeco. Inter la kondiĉoj estis, ke mi ne rajtas komenci ĉe la eniro per artifiko kaj diri, ke ni vetis kun mia amiko kaj tiel plu, kaj ke devas esti la unua loĝejo kiu estos la scenejo de la privetita agado. Tiel estis.

– Nu, kaj?

– Nu, kaj ni eniris telefonejon por elekti adreson. Mi elektis bonsonan nomon, arkitekton; ne estis malfacile trovi sur la urbokarto, kie estas la strato: la familio loĝis ĉe la ĉefa strato, kaj tute simple mi sonorigis sur la pordo.

– Ni nur baldaŭ povos supreniri – diris tiu, kiu aŭskultis la rakonton.

– Ni restu prefere ĉi tie. Vi vidis, ke ili revenos.

– Nu, bone. Daŭrigu do... Estas streĉa historio.

– Jen la daŭrigo:

Ĉambristino malfermis la pordon. Ŝi estis modelo de ĉarmaj kaj samtempe impertinentaj ĉambristinoj. Mia kamarado havis emon halti ĉe la enirejo kaj resti ĉe la ĉambristino. Sed mi ne cedis al liaj rigardoj. Mi estis "en bona formo". Mi demandis, ĉu fraŭlino N. estas hejme? Mia kamarado ridaĉis malice. Nun montriĝos, ke fraŭlino N. ne ekzistas. Sed mi estis certa kaj efektive mi havis bonŝancon. Fraŭlino N. ekzistis kaj eĉ jam venis el la ĉambro por akcepti nin. Ŝi demandis: "Ĉu vi jam alvenis" kaj ŝi aldonis tre afablan "koran bonvenon!"

Tiu akcepto embarasis min kaj eĉ pli mian, cetere aŭdacan kamaradon, kvankam lia kuraĝo havis iaspecan socian limon. Li estis komencanto en la fako de Casanova, sed liaj viktimoj estis ĉiam servistinoj. Li tute ne estis intelekta tipo. Ni sidis tie hezitemaj kaj timantaj. Ankaŭ mi estus preferinta esti ekstere. Ni ricevis strangan helpon de la hazardo. Nun la problemo estis, ĉu ni povos eluzi ĝin aŭ ne. Kiujn atendis la knabino? Mi estis tiel konfuzita, ke mi eĉ ne sciis, kia ŝi estas; mi ne alrigardis ŝin, nur aŭskultis la unuajn konvenciajn vortojn, kaj sub mia embaraso la melodia, juna voĉo sorbiĝis en mia konscio, kiel tre agrabla plezuro: Agrabla, sed danĝera, mi pensis. Ni estis jam en la bela salono de la familio...

– de kie oni baldaŭ elĵetis vin – diris la aŭskultanto de la rakonto. – Vi pravis, la eroplanoj revenas. Estas denove alarmo!

– Ni restu do trankvile ĉi tie. Ĉu mi daŭrigu? – Kompreneble.

– Ne estis tiel simple. Neniu elĵetis nin. Ni eksidis en la salono, kies detalojn mi ne perceptis, nur ĝian kulturan etoson; dum ni konversaciis, mi cerbumis, kiel ni povus ekscii kiuj nun ni estas. La fraŭlino komencis demandi pri siaj amikoj, Antono kaj Katerina, kaj mi diris, ke Antono fartas bone, tamen li bezonas ion da ripozo post la printempa ĉefsezono... mi time alrigardis ŝin, sed mi ne diris ion stultan... mi diris, ke Katerina malvarmumis (mi supozis, ke Katerina ne estas tiel kontraŭstara kiel Antono, kiam temas pri malvarmumoj), sed ĉiukaze ŝi jam fartas tute bone kaj ili ambaŭ kore salutas ŝin kaj ke ili jam antaŭe estis nin certigintaj, ke ni havos grandan plezuron interkoniĝante kun fraŭlino N., kion ni nun vere povas aserti. Mia amiko funkciis kiel bas-akompano kaj ĝis nun ĉio progresis bonege. Nun mi jam kuraĝis eĉ rekte alrigardi ŝin; ŝi ne povis esti pli maljuna ol 23-jara kaj verŝajne ne pli juna ol 19. Ŝia varma, agrabla, ne

elstare bela vizaĝo kaj ŝia mallaŭta, bela kaj kultura voĉo vekis unue la sentojn kaj ne tuj la sensojn. Ŝi estis unu el tiuj virinoj, kiuj vere uzas siajn okulojn kiel fenestrojn de la animo. Ŝi gajnis de momento al momento pli kaj pli da simpatio. En la rulfajro de la demandoj mi ne havis tempon por ekhonti kaj pensi pri nia stulta ŝerco. Mi eĉ sentis ekscitan plezuron: jen estis ekvacio kun multaj nekonatoj, kaj jen ili komencis malpliigi. Ni proksimiĝis al la kompleta solvo. Jes, tio venis. Ĝi venis tiel, ke ŝi subite kaj bonhumore diris ion, per kio ŝi rigidigis la rideton sur nia vizaĝo. Nia sango haltis en niaj vejnoj: "Mi tute forgesas" ŝi diris "ke ni estas esperantistoj! Kial ni ne parolas Esperante?" Tie sidis mia kamarado, subite paliĝinta, kaj tie sidis mi, atendanta la finon de la mondo. (Aŭskultu, nova signalo... Ili baldaŭ denove estos ĉi tie! Ne gravas, mi daŭrigas). Mi ne havis intereson pri Esperanto; eĉ malpli mia kamarado. Li havis tute aliajn ideojn ol la interfratiĝo de la homoj. Li estis forta ŝovinisto kaj poste li iĝis konvinkita partiano inter la brunĉemizuloj. Sed mi havis kuzon, kiu studis kaj propagandis Esperanton. Multe li ne kapablis paroli kaj iam mi aŭdis; ke li respondis al alparolo: "Pardonon, mi estas nur komencanto". Per tiu ĉi frazo mi mokis kaj incitis lin konstante. Tiu ĉi frazo savis min por tiu ĉi momento. La alia esprimo, kiun mi konis en Esperanto, "Ĝis revido!", ankoraŭ ne estis aktuala. Sed la unuan mi povis uzi, kaj sendante dankesprimon al la ĉielo pro la mankohavaj scioj de mia kuzo, mi diris al ŝi: "Pardonon, mi estas nur komencanto". Mia kamarado, komprenante, ke la lasta vorto havas ian senkulpigan gravecon, diris kun la plej malbela prononco de la Esperanto-vorto: "Kommensando". Tiel ni savis nin, kaj la afero ne prezentis komplikaĵojn dum la sekvaj du-tri minutoj, kvankam ni jam sciis, ke ni estos senmaskigitaj, kaj miaj genuoj komencis tremi, dum mi pensis pri la lasta, sed drama sceno, kiam mi devos forlasi tiun ĉi belan hejmon kun ĝia animo. Ni vidis neniun el la aliaj familianoj. Miaj sentoj varmiĝis kun danĝera rapideco. Ŝajnis, ke ankaŭ mia kamarado moliĝas. Sed nun abrupte aperis la komenco de la fino. La knabino diris: "Sed strange, ke vi venis preskaŭ tutan horon pli frue, ol Katerina menciis en sia letero: Laŭ tiu vi devus veni precize je la kvara". Mi rigardis mian horloĝon. Mankis dek minutoj ĝis la kvara. Post proksimume kvaronhoro alvenos la veraj atenditoj, kaj ni estos stampitaj kiel trompisto. Terura situacio! Vi ridas ĉi tie, sed tiam tio estis multe pli terura ol tiu bruo supre. Almenaŭ al ni. Oni povis pensi nur pri tuja foriro, sed tio estis neebla; la tablo estis jam kovrita kaj ni sentis la vaporon de la freŝe rostita kafo. Dum la cerbumado pasis pluaj, multekostaj, du-tri minutoj. Mi komprenis, ke nur

kuraĝa operacio povas savi nin. Mi ekstaris kaj diris al nia nova amikino: "Fraŭlino N., mi ŝatus kun vi paroli inter kvar okuloj". (Mi ne volis kavi atestanton al mia konfeso, eĉ ne mian amikon). Ŝi sekvis min kun mirantaj okuloj en la alian ĉambron.

Mia konfeso komenciĝis per tio, ke mi prezentis min; efektive ni ne prezentis nin komence, sed nek ni nek ŝi tion rimarkis. Post tio mi lasis tempon nek por interjekcioj, nek por rimarkoj. En unu spiro mi konfesis, pardonpetis, denove pardonpetis, ripete konfesis, kaj apenaŭ mi atingis la finon de miaj rakonto kaj klarigo, ni aŭdis sonorigon. La esperantistoj, kies lokon ni uzurpis, alvenis.

– Kiel ŝi akceptis vian historion.

– Estis tre interese. Komence ankaŭ ŝi ne sciis, kion diri, sed fine ŝi ridis, ridegis; ŝiaj larmoj same perlis pro la rido, kiel ŝia rido mem. Mi kredas, ke ŝi sentis sin feliĉa: ni ambaŭ estis bonaspektaj junuloj, tute ne sen sprito.

– Precipe vi, ĉu ne?

– Mi ne scias, ĉu tio estis ŝia opinio, sed ŝi estis feliĉa, ĉar ŝi povis pruvi al ni la pravon de Esperanto. La aliaj du gastoj estis simpatiaj junuloj kaj dum la tuta posttagmezo ni restis kune. Ŝi gardis nin tre afable, tute ne parolante pri nia friponaĵo. Ni estis gastoj el alia direkto; pli multe la aliaj ne sciis pri ni. Sed io kaptis min tiam. Tiu ĉi historio estas pli ol okjara, sed mi bone memoras ĝuste pri io speciala. Antaŭ nia foriro de ili mi demandis ŝin pri io, ĉar mi estis ekstreme skeptika. La societo intertempe pligrandiĝis, ni interkoniĝis kun ŝia tuta familio, tiel, ke efektive estis okazo al mi diskuti nur kun ŝi: Mi formulis mian demandon proksimume jene: "Sed ĉu povas esti, ke vi vere kredas pri la paciga forto de via Esperanto?"

Ŝi respondis: "Nu, jen: al mi ĉiuspeca fanatikeco estas fremda, eĉ timiga. Tio, kion ni vidas ĉirkaŭ ni sufiĉas, por ke ni timu la ekzaltecon. Mi iĝis iam esperantisto, ĉar tiam mi estis tute juna kaj idealisto: eble ankaŭ tio havis decidan gravon, ke mi esperis multe da plezuroj, facilaj plezuroj. Por mi malfermiĝis la mondo, kiam ĝi malvastiĝis por la aliaj. Kiel esperantisto mi travivis ravajn epizodojn, surprizajn por ĉiu pesimisto. Daŭrus tre longe paroli pri tio. Sed unu afero estas certa: ke el tiuj mozaikeroj jam elformiĝas tute klara konvinkiĝo. Ĝi ne estas plu supra bildo; ĝi havas profundon kaj perspektivon. El la plezuroj fariĝis taskoj kaj konscio, el la konscio konscienco; respondeco pri ĉio, kio okazas en la mondo..."

"Dostojevski" mi diris.

"Jes iel, kiel Dostojevski komprenas kaj komprenigas la respondecon de ĉiu unuopulo. Nun mi eble ne scias, ĉu mi povas kredi pri la proksima sava

rolo de Esperanto; patentmedicino ĝi ne estas. La tempoj estas pli kaj pli malhelaj: kio povas sekvi, pri tio mi eĉ ne volas pensi. Sed tamen mi kredas – jes, mi kredas... sed cetere la demando ne plu povas esti, ĉu mi kredas, ĉar mi tute simple vivas en Esperanto".

Proksimume tiel ŝi diris. La aŭskultanto demandis:
– Kiel estis poste?

Poste mi mem iĝis esperantisto.

La bruo plifortiĝis. Sed tio estis la propraj kanonoj. La aliaj nun certe estis proksime. Ĉu la celo estis la stacidomo? Nu, tiu spektaklo ne daŭros longe. Estis eksplodo ie pli proksime. Ne gravas.

– Kaj poste?

– Nenio estis poste.

– Ĉu vi enamiĝis al ŝi?

– Jes, iel simile. Sed ŝi preferis mian amikon. Ŝi ne povis esti feliĉa. Li tirigis al aliaj magnetoj.

– Kie li nun estas?

– Li kuŝas en amastombo en Balkano. Li estis volontulo.

– Kaj ŝi?

– Ŝia patro estis gvidanta liberpensulo. Malamiko de la nacio, kiel oni diras. Mi ne scias, kie ŝi povas esti. Eble ŝin savis ŝia bona stelo.

– Kion vi pensas do nun?

– Mi havas nur unu brakon kaj povus havi kaŭzon por esti amara. Sed mi ne estas tia. Mi ofte pensas pri tiu ĉi epizodo. Estis interese interkoniĝi kun tiu knabino. Estus bone scii, kie ŝi estas. Estus bone scii, kie estas niaj similuloj. Sentimentala mi ne estas, sed mi havas la guston de bela, homa travivaĵo en mia

animo. Mi pensas ofte nun pri la vortoj de Dostojevski: "Ĉiu el ni estas respondeca por ĉiuj kaj por ĉio, kio okazas sur la tero". Mi kredas, ke ankaŭ nun formiĝas tiaj mozaikoj; ankaŭ nun, dum tiuj ĉi senhontaj tempoj maturiĝas homaj pensoj, kiuj signifas Esperanton, aŭ simple fratajn ideojn. Kio ajn okazas, mi kredas pri tio.

La infera klakado de la flugmaŝinoj subpremias ĉiun penson kaj ĉiun vorton.

– Nun ili estas super ni. Ho –

* * *

El la bombŝirmejo de la vilao oni elfosis du junajn virojn. La unubrakulo, la rakontinto, jam ne plu vivis, sed la alia militkriplulo jes. Baldaŭ klariĝis, ke liaj vundoj estas malgravaj. Rekonsciiginte li baldaŭ retravis la lastajn vortojn de sia kamarado. Li ne plu estis videbla al li; li vidis nur sangon. Li ne sciis, ĉu estas lia propra aŭ tiu de la kamarado. Rigardante la ruinojn, li murmuris al si frazon, kiun li volis eldiri antaŭ la eksplodo. Estis alia frazo, citaĵo el la Kulpo kaj puno de Dostojevski. Li ne havis tempon diri ĝin kaj nun li provis per ĝi formi ponton super la abismo, kiu disigis la vivanton de la mortinto:

"Mi klinas mian kapon ne antaŭ vi, sed antaŭ la suferoj de la homaro".

La vivo volis vivi kaj sekvis novaj taskoj.

de **Ferenc SZILÁGYI**

Aperis en *Koko krias jam*, Régulo 1955

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/08.html>

Simio kaj Okulvitroj

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Simio en maljun' malbone tute vidis,
Sed homa fam' al ĝi konfidis,
Ke tiu malbonaĵ' ne estas ja danĝer'
Ĉar okulvitroj savas de sufer'.
Do vitrojn en abund' akiri ĝi decidis,
Ĝi turnas ilin por aplik':
Jen premas al la vert', jen sur la voston metas,
Jen flaras kun singard', per lango jen leketas,
Sed en rezult' — nur nulo por efik':
"Fiaĵo kia! Estas granda stult'
Al homoj kredi en aŭskult'.
Pri vitroj onidir' ja nur mensogo estis,
Kaj mankas la util' en tiu-ĉi afer'".
Dirinte la Simi' ĉagrenon manifestis,
La vitrojn ĵetis ĝi al ŝtono en koler'
Kaj post frakas' nenio restis.
Por homa gent' ĝi estas la spegul':
Jen bona aĵ' ekŝajnas kiel nul'
Kaj ignorant' pri utilec' diskutas,
Kaj se li estas altrangul', Do li eĉ persekutas.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearmila mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinara armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.

Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj. “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

4) Tero leviĝis, homoj forflugis, fajroj okazis



verkita de s-ino Hanagaki Rumi 79-jara, loĝanta en Kioto, tradukita el la artikolo de la ĵurnalo Akahata la 6an de aŭgusto 2019 (Foto: ŝi parolas pri sia sperto en radiostacio)

En 2003 mi partoprenis en la ceremonio por memori la mortintojn en Hiroŝima. Reveninte hejmen,

mi komencis skribi raporton pri ĝi, kaj tiun momenton subite reaperis en mia kapo pejzaĝo pri lanterno-flosado. Mi demandis min, kio ĝi estas. Mi estis subpremita de la revenantaj memoroj kaj tremante mi tenis min ĉe la lito de mia nepo.



Malgraŭ tiuj ŝokaj memoroj, mi finis verki raporton pri la ceremonio. Kiam mi relegis ĝin, mi ne povis legi ĝin pro larmoj, kaj kiam mi korektis la enhavon, denove nova memoro revenis. Tio estis terura momento.

La 6an de aŭgusto 1945, mi loĝis en la distrikto Misasa-Honmaĉi en la urbo Hiroŝima. Alarmo pri aeratako nuliĝis, do mi revenis hejmen kaj en la dua etaĝo de mia domo mi ludis. Kiam la atombombo estis faligita, mi sentis la teron leviĝi kaj poste venis terura bruego. Pro varmegaj ondoj kaj impulsaj ondoj fenestroj kaj kurtenoj estis forblovitaj. Kojno el meblo pikiĝis en mian kapon kaj la angulo de la ŝranko enpuŝiĝis en mian frunton.

Avino en lito estis forblovita kun lito, sed ne vundiĝis. Ankaŭ patrino en la ĝardeno kun mia frato sur la dorso estis forblovita, sed nenio serioza okazis al ili. Baldaŭ vidiĝis fajroj en diversaj lokoj. Onklino trovis tirĉaron kaj portis la avinon sur ĝi. Ni fuĝis en la najbaran bambuan arbaron. Ŝi trovis getaojn, lignajn sandalojn, por mi.

En la bambua arbaro estis kokinejo. Mi vidis senkapajn kokinojn, ankaŭ senkapan katon kaj multajn cikadojn mortaj sur arboj. Bambuaj folioj ekflamis, kaj bambuoj eksplodis kun krakadoj. Mi estis surprizita, vidante mian patrinon piki kadavrojn per stango. Ŝi provis forpeli kokinojn, kiuj bekpikis ilin.

Dum mi fuĝis, mi vidis pupon, kiu similis al la pupo, kiun mia patrino faris por mi. Ĝi bruletis. Mi sentis grandan malĝojon.

Kiam mia patrino reprenis mian fraton de sur la dorso, haŭto ĉe liaj sidvangoj deŝiriĝis, eble ĉar li ricevis varmegon de fajro. Ŝi tranĉis parton de sia vestaĵo, moligis ĝin en manoj kaj metis ĝin ĉe liajn sidvangojn.

Filo de mia onklino, Tojohiko, lernanto en la unua lernejo, estis en la lernejo. Post tritaga serĉado ni trovis lin sur la riverbordo kaj tie bruligis lin. Multaj homoj plonĝis en la riveron, kaj mortinte ili estis portitaj al la maro kaj revenis pro tajdoj, kaj fine atingis la riverbordon. Mia onklino vizitis tiun lokon ĉiun jaron ĝis sia morto. Laŭ la riverbordoj de Hiroŝima ofte vidiĝas tia pejzaĝo.

Mia patrino mortis en la aĝo de 84 jaroj pro kancero. Mi fartas bone, sed mia filino, kiu suferis pro

renmalsano, fariĝis melankolia, sin mortigis. Mi kritikis min pro ŝia morto. Kiam mi aŭdas, ke miaj gefiloj kaj genepoj ne fartas bone, mi timas, ke mia elmetiĝo al radioaktiveco el la atombombo povis kaŭzi ilian malsaniĝon.

Mi nun agadas, rakontante mian sperton en kaj ekster Japanio. Por efektiviĝi sennuklearmilan mondon ni devas agadi energie. Ni estu la lastaj suferantoj pro nukleaj armiloj. La japana registaro rifuzis subskribi por la internacia pakto por aboli nukleajn armilojn, sed ĝi subskribu. La mondo mokas Japanion.

Foje mi vizitas la Pacparkon en Hiroŝima, kaj tiam

mi kutimas fari unu aferon. Mi batetas la teron per bastono kaj salutas la mortintojn, verŝante akvon el botelo. Sub tiu parko estas multaj ostoj, kiuj ne estis kolektitaj. Mi alparolis al ili, "Vi sentis varmegon tiun




tagon. Trinku akvon. Ni ĵuras al vi, ke ni neniam ripetos tiun eraron, uzon de nukleaj armiloj".

Dimanĉa poezio: Vasilij Devjatnin

-- el La Balta Ondo

En nia novaĵretejo dum la tuta aŭtuno ĉiudimanĉe aperas poemoj el la nova, kvara eldono de la Baza Literatura Krestomatio. La kvara aŭtoro en nia dimanĉa versrubriko estas Vasilij Nikolajeviĉ Devjatnin (Девятнин, 1862-1891-1938), lingvoinstruisto, estro de subdistrikta polico, Esperanta prelegvojaĝanto kaj verkisto.



Vasilij Devjatnin iĝis konata en Esperantujo pro sia traduko de Demono de Lermontov (1894), kiun sekvis pluraj tradukoj kaj originalaĵoj versaj kaj prozaj. Ni proponas al vi lian humuran poemeton, kiun li verkis dum sia kelkjara antaŭmilita restado en Eŭropo.



Tiam Esperanto floris kaj furoris en Parizo. La Pariza Esperanto-Grupo kun pli ol 1000 membroj havis fakojn kaj sekciojn en urbaj kvartaloj. Ĉiujare funkciis pli ol cent kursoj de Esperanto. Ĉiumonate okazis komuna vespermanĝo en Hôtel Moderne,

kutime kun alilanda gasto (plurfoje kun Zamenhof). Fondiĝis monduma grupo por esperantistaj aristokratoj. Oni povis ĉiutage viziti esperantistan kunvenon. Devjatnin faris tion kaj verse resumis siajn impresojn.

Agrablan legadon!

29 Septembro 2019 de AIKo

PARIZA ESPERANTA SEMAJNO

Lundo. Kunveno de l' luksa mondumo: Franclingva parolo, frakaro, parfumo.

Mardo. Negranda rondeto de l' Sudo, Antaŭen marŝanta per paŝ' de testudo.

Merkredo. Tre gaja Deksesa sekcio: Lumbildoj, kartludo kaj konversacio.

Ĵaŭdo. La juna kvartalo Dekkvina: De la prezidant' babilado senfina.

Vendredo. Kunveno de homoj meritaj: Paroloj senĉesaj kaj ofte... senspritaj.

Sabato. Senzorga Latina sekcio: Ĝi revas pri dancoj kaj plu – pri nenio.

Dimanĉo. Ripozo ĝis tago sekvanta, Kaj poste – denove al vivo bruanta!..

Ĉi tiu poemo aperis inter la 199 verkoj/fragmentoj de 82 aŭtoroj, publikigitaj en la nova eldono de la Baza Literatura Krestomatio (BLK) (p. 29), kuneldonita de Sezonoj (Kaliningrado) kaj Litova Esperanto-Asocio en julio 2019.

Legu pli pri BLK <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga121.htm>

Aĉetu ĝin kontraŭ 27 eŭroj en la libroservo de UEA Ĝis la sekva dimanĉo!

AIKo (Aleksandro Korĵenkov)

Fonto: La Balta Ondo

<https://sezonoj.ru/2019/09/blk-3/>

Malmultaj lingvoj havas naskiĝtagon, sed ni scias, precize kiam Esperanto naskiĝis. La unua lernolibro de Esperanto aperis la 26-an de julio 1887, kaj tiun daton oni konsideras la naskiĝdato de la lingvo.

Ni nun nomas tiun libron la Unua Libro. Ĝi aperis en la rusa, sed poste en tiu sama jaro en la pola, germana kaj franca lingvoj. En 1888 ĝi aperis en la angla, tamen la traduko estis tiel fuŝa, ke la postan jaron necesis ĉesigi ĝian vendadon kaj retraduki ĝin.

En la komenco la lingvo ne nomiĝis Esperanto. La titolo de la libro en la diversaj lingvoj estis Lingvo Internacia, kaj ĝia verkinto, L.L. Zamenhof, prezentis sin per la kaŝnomo Doktoro Esperanto. Tre baldaŭ okazis, ke la homoj komencis doni la nomon Esperanto al la lingvo mem.

La malgranda libro enhavis nur 40 paĝojn. Pli ol duono de la teksto konsistis el antaŭparolo, en kiu Zamenhof prezentis la ideon kaj idealojn de internacia lingvo, kaj mallonge klarigis pri ĝia tre simpla gramatiko kaj pri la uzo de la afiksoj. Estis ankaŭ pluraj ekzemploj de tekstoj verkitaj en la nova lingvo: la preĝo Patro nia, mallonga eltiraĵo el la Biblio, kaj letero verkitaj en Esperanto kiel modelo de korespondaĵo. Sed estis ankaŭ tri poemoj, unu de la germana poeto Heine, kaj du originalaj poeziaĵoj de Zamenhof mem: Mia penso kaj Ho, mia kor'. Estas rimarkinde, ke Zamenhof tuj elektis prezenti Esperanton kiel literaturan lingvon, kaj ne nur kiel praktikan ilon por vojaĝado kaj komerco.

Sekvis la tiel nomata "Plena lernolibro", nur 6-



paĝa, konsistanta el prezento de la alfabeto kaj 16 gramatikaj reguloj.

Estis ankaŭ granda aldonita folio kun vortaro en la rusa. En tiu folio estis prezentitaj 917 radikoj. Kompreneble per 917 radikoj en Esperanto eblas fari multe pli ol per la sama nombro de vortoj en alia lingvo.

Laste, estis ok slipetoj, kiujn la leganto povos elŝiri, subskribi kaj resendi al "D-ro Esperanto". Sed pri tiuj eblas legi en aparta artikolo.

Mankas en la Unua Libro ekzercoj de la speco, kiun oni normale trovas en lernolibro. Oni vidas, ke la celo de Zamenhof per tiu unua libro estis nur prezenti la ideon de internacia lingvo, ne vere instrui ĝin. Sed per la klarigoj, la vortaro kaj la tekstoj, interesatoj jam trovis sufiĉe da materialo por mem kompreni, kiel la lingvo funkcias.

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/la-unua-libro/>

(eblas ankaŭ aŭskulti la artikolon en ĉi tiu paĝo)

Poezia mateniĝo

-- de Gafur Gazizi el Baŝkortostano

Sun' superba sugestias
en somermateno min,
per fascino fantazia
ebriigas kvazaŭ vin'.

Ĝoje, ĝue en ĝardeno
mi min banas per l'aŭror...
Serenadon al sereno
laŭte laŭdas birda ĥor'.

Freŝo friska frenezigas,
polmotrinkas roson mi ...
Min inspiras, min instigas
la maten' al poezi'!



verkis kaj sendis **Gafur Gazizi**
el Baŝkortostano

Mi jam raportis en pluraj artikoloj atestaĵojn pri restaĵaj homeculoj, eble lastaj neandertalaj homoj. Atestaĵoj nuntempaj ankaŭ estas, ĉefe en eksa Sovetio kaj centra Azio ; ilin studis Michael Trachtengerts, Dimitri Bayanov, Boris Porchnev. Sed en Eŭropo ili malaperis ; ŝajnas, ke la lastaj vidoj estis en Transilvaniaj Alpoj (nuna Rumanio) far Michael WAGNER kaj en eŭskaj Pireneoj, dum la 18-a jarcento.



Sur muro en Andaluzia urbo Ubeda – ĉu mez-epoka bildigo de restaĵa homeculo?

Multaj rakontoj portas pri detaloj tiom strangaj « kiujn oni ne povis elpensi » ekzemple en Hispanio ekzemple klasika estas la spito de la ĉevalo kies voston la kamparanoj trovas matene, post vekigo, nodata per strangaj harplektaĵoj. » (aperita en Turka Stelo sendita de Maurizio Brucco el Hispanio). (ĉi tie

oni povus aldoni la klarigon (esperatigitan)



Sed, tamen estas unu rakonto multe pli novtempa, kiu rilatas al Hispanio, jen ĝi :

En vilaĝo Cuevas-Bajas, provinco de Malago, estis juna paro, do konjekteble naskita ĉ. 1900, kiu ĉ. 1920 iris en la Sierra Morena por paŝti brutojn. Ili vivis izolitaj en kabano. Foje dum kiam la edzo esti for, la juna virino malaperis. Ĉiuj kredis, ke ŝi estis vorita de sovaĝa besto. Sed kelkaj tagoj poste ŝi reaperis, kaj rakontis strangan historion : Ŝi esti rabita de granda « simio », kiu forprenis ŝin en sian kavernon, kaj perfortis ŝin.. Poste profitante de ties malĉeesto ŝi sukcesis fuĝi. Kelkajn monatojn poste ŝi naskis infanon : filinon, kiun oni baptis Anica, sed kromnomis « la hija del orang-utang » (la filino de la Orangutano). Tiu havis kelkajn trajtojn de sia patro, ĉefe en la malsupera parto kaj la longaj brakoj. Ŝi mem naskis poste du filojn, kiuj eble plu vivas, en la urbo Labisbal (provinco de Gerona), unu el ili estis tute home normala, sed la dua estis kromnomita « la fromaĝo » pro lia simieca aspekto.

(raportita far Daniel Fabre en sia libro pri « Jean-de-l'Ours »)

Kore,

Roland Platteau el Francio



« sovaĝa viro » bildigita de 16-jarcenta germana artisto, eble inspinta de rakontoj pri restaĵaj homeculoj

Herbert George Wells, pli ofte menciita kiel H. G. Wells [Ŭels] (1866-1946), estas unu el la fruaj pioniroj de scienc-fikcia literaturo kaj ĉefe konata pro tiaj rakontoj kaj noveloj, kiel ekzemple „La Tempo-maŝino“ aŭ „La Milito de la Mondo“. Malpli konataj estas liaj ne-sciencfikciaj, sed kuriozaj aŭ fantastaj rakontoj. La „Perlo de Amo“, unue publikigita en 1925, komenciĝas kiel klasika fabelo, sed havas surprizan finon.



La perlo estas pli ĉarma ol la plej brila kristala ŝtono, ĉar ĝi estiĝis pro la suferado de vivanta kreaĵo, deklaras la moralisto. Pri tio mi ne povas juĝi, ĉar mi sentas nenion de la fascino pri perloj. Ilia nebuleca brilo tute ne emocias min, nek mi povas decidi pri tiu longedaŭra disputo, ĉu ‘La Perlo de Amo’ estas la plej kruela rakonto aŭ nur rava fabelo pri la senmorteco de beleco.

Ambaŭ, la rakonto kaj la debato pri ĝi, estas bone konataj al spertuloj pri mezepoka persa prozo. Estas mallonga rakonto, tamen la komentario pri ĝi estas konsiderinda parto de la tiuepoka literaturo. Oni konsideris ĝin poeta elpenaĵo aŭ alegorio kun la signifo de ĉi tio, tio aŭ alio. Teologoj abunde okupiĝis pri tio, traktante speciale la restaŭradon de la postmorta korpo, kaj ĝi estis vaste uzata kiel parabolo de tiuj, kiuj skribas pri estetiko. Kaj multaj opiniis ĝin priskribo pri reala fakto, simple kaj sobre vera.

La rakonto okazis en norda Hindujo, la plej fruktodona tero por sublimaj amrakontoj. Estis lando de sunbrilo, lagoj, riĉaj arbaroj, montetoj kaj fekundaj valoj; kaj malproksime la granda montaro leviĝis alten en la ĉielon kun pintoj kaj montodorsoj de neatingebla

kaj eterna neĝo.

Estis juna princo, lordo de la tuta lando; kaj li trovis junan virinon de nepriskribebla beleco kaj ĉarmo kaj li faris ŝin sia reĝino kaj metis sian koron antaŭ ŝiajn piedojn. Ili amis unu la alian. Estis amo, plena de ĝojo kaj dolĉeco, plena de espero, delikata, brava kaj grandioza amo, transe de iu amo, pri kiu vi iam revis. La amo daŭris iom pli ol unu jaron; sed tiam, subite, pro venena piko, kiun ŝi suferis en planta densejo, ŝi mortis.

Ŝi mortis kaj dum ioma tempo la princo estis treege senespera. Li silentiĝis, senmove kaj afliktite. Oni timis, ke li povus sin memmortigi, kaj li havis nek filojn nek fratojn, kiuj povus sukcedi lin sur sia trono. Dum du tagoj li kuŝis sur sia vizaĝo, fastante, ĉe la piedo de la kuŝsofo, kiu portis ŝian kvietan kaj amandan korpon. Poste li ekstaris kaj manĝis, kaj ĉirkaŭiris tre trankvile, kiel iu, kiu faris grandan decidon. Li kuŝigis ŝian korpon en ĉerkon de plumbo, miksita kun arĝento, kaj por tiu li farigis eksteran ĉerkon, farita de la plej valoraj kaj bonodoraj lignoj, kovrita de oro, kaj ĉirkaŭ ambaŭ ĉerkoj devis esti sarkofago de alabastro, inkrustita per valoraj ŝtonoj. Kaj dum la tempo, kiam tio estis farata, cerbumante pri ŝia ĉarmeco, li pasigis la plejmulton de sia tempo apud la lagoj, en la ĝardendomoj, pavilonoj kaj boskoj kaj en tiuj ĉambroj de la palaco, kie ili ambaŭ pasigis kune la plejmulton de sia tempo. Li ne disŝiris siajn vestaĵojn, nek humiligis sin per cindro kaj saktola vestaĵo, laŭ la moro, ĉar lia amo estis tro granda por tiaj troigoj. Fine li reaperis inter siaj konsilantoj kaj antaŭ la popolo, kaj diris al ili, kion li intencas fari.

Li diris, ke li neniam plu povu tuŝi iun virinon, li neniam plu povu pensi pri ili, kaj do li trovos decan junulon, kiu transprenu sian heredaĵon, kaj kiun li volas eduki por lia tasko, kaj ke li plenumos siajn princajn devojn kiel decas al li; sed krome, li dediĉus sin per sia tuta povo kaj forto kaj sia tuta posedaĵo, havigi ĉion, por konstrui monumenton, inda je sia nekomparebla, kara, perdita amatino. Konstruaĵo, kiu devu esti perfekte gracia kaj bela, pli grandioza ol iu alia konstruaĵo, kiu iam estis konstruita aŭ povus esti konstruota, do ĝis la fino de l’ tempo ĝi restontus miraklo, kaj homoj valorigus ĝin, parolus pri ĝi, dezirus ĝin vidi kaj venus de ĉiuj landoj de la mondo por viziti kaj memori lian reĝinon kaj ŝian nomon. Kaj li diris, ke tiu konstruaĵo estu nomata la Perlo de Amo.

Kaj tion permesis al li siaj konsilantoj kaj la popolo, do li ekfaris tion.

Jaro sekvis jaron kaj dum la tuta tempo li dediĉis



sin al la konstruo kaj plibeligo de la Perlo de Amo. El la roko oni elhakis grandan fundamenton en loko, de kie oni povas rigardi al la neĝa sovaĝejo de la granda monto trans la valo de l' mondo. Vilaĝoj kaj montetoj troviĝis tie, sinua rivero, kaj tre malproksime tri grandaj urboj. Ĉi tien ili metis la sarkofagon el alabastro sub pavilono de lerte farita artmetiaĵo; kaj ĉirkaŭ ĝi estis starigitaj kolonoj de eksterordinara kaj gracia ŝtono, forĝitaj kaj aĵuraj muroj, kaj granda templo de ŝtontajlista faritaĵo, portante kronon, turopintojn kaj kupolojn, ravegaj kiel juvelo. En la komenco la plano pri la Perlo de Amo estis malpli aŭdaca kaj lerta, ol ĝi fariĝis pli poste. Komence ĝi estis pli malgranda, sed pli prilaborita kaj ornamita; estis tie multaj truitaj apartigaj vandoj kaj gracilaj aroj de rozkoloraj kolonoj, kaj la sarkofago kuŝis tie kiel infano, kiu dormas inter floroj. La unua kupolo estis kovrita per verdaj kaheloj, kadritaj kaj kunligitaj per arĝento, sed tiu estis forprenita denove, ĉar ĝi ŝajnis esti tro malvasta, kaj ĉar ĝi ne leviĝis sufiĉe grandioze por la plivastiĝanta fantazio de la princo.

Je tiu tempo li ne plu estis la gracia junulo, kiu amis la knabinan reĝinon. Nun li estis viro, serioza kaj atenta, tute koncentrita sur la konstruo de la Perlo de Amo. Dum ĉiu jaro de klopodo li lernis novajn eblecojn pri arkoj, muroj kaj pilastroj; li akiris pli grandan povon super la materialo, kiun li devis uzi kaj li lernis de centoj da ŝtonoj, koloroj kaj efektoj. Tion li ne povis antaŭsupozi en la komenco. Lia percepto de koloroj kreskis pli fajne kaj pli pripenseme; li ne plu okupiĝis pri la emajlita oro-garnita brileco, kiu plaĉis al li en la komenco, la brileco de iluminita meslibro; nun li sopiris por blua kolor-impreso, samaspekta kiel la ĉielo kaj por subtilaj nuancoj je grandaj distancoj, por profundaj ombroj kaj surpriza vasta torento de purpura opalesko, por imponeco kaj spaco. Tute tedis lin la ĉizaĵoj, pentraĵoj kaj inkrustitaj ornamaĵoj kaj ĉiuj tiuj etaj zorge faritaj laboraĵoj de homoj. "Tiuj estis beletaj aĵoj," li diris pri siaj antaŭaj dekoraciaĵoj kaj flankenmetis ĝin en subalternajn konstruaĵojn, kie ĝi ne ĝenu sian ĉefan projekton. Pli kaj pli granda kreskis lia artosento. Kun respekto kaj mirego la homoj vidis la Perlon de Amo rapide kreskante alten de sia ekkomenco ĝis superhoma vasteco, alteco kaj grandiozeco. Ili ne klare sciis, kion ili povas atendi en la komenco, sed neniam ili atendis tian subliman aĵon. "Mirindaj estas la mirakloj, kiujn la amo povas estiĝi", ili flustris, kaj ĉiuj virinoj en la mondo, kiu ajn alian amaton ili havis, amis la princon pro la sublimeco de lia dediĉo.

La mezon de la konstruaĵo trairis granda koridoro, kiu ebligis elvidon, pri kiu la princo okupiĝis pli kaj pli.

De la interna eniro de la konstruaĵo li rigardis laŭlonge de grandega galerio kun kolonoj kaj trans la centra areo, de kie la rozkoloraj kolonoj delonge malaperis, trans la supro de la pavilono, sub kiu kuŝis la sarkofago, tra belege aranĝita koridoro, al la neĝkovrita sovaĝejo de la du mil mejlojn fora granda monto, la lordo de ĉiuj montoj. La kolonoj, arkoj, pilastroj kaj galerioj leviĝis kaj ŝvebis je ambaŭ flankoj, perfektaj tamen ne tro pompaj, kiel grandaj ĉefanĝeloj atendante en la ombroj la ĉeeston de Dio. Kiam la homoj vidis la unuan fojon tiun severan belecon, ili estis ravitaj, kaj poste ili ekstremis kaj siaj koroj riverencis al tio. Tre ofte la princo venis por stari tie kaj rigardi al tiu koridoro, profunde kortuŝita, sed ne ankoraŭ plene kontenta. Li sentis, ke la Perlo de Amo postlasis al li iun farendaĵon, antaŭ lia tasko estas plenumita. Ĉiam li ordonis kelkajn farotajn etajn ŝanĝojn aŭ retiris antaŭajn. Kaj iun tagon li diris, ke la sarkofago estus pli klara kaj simpla sen la pavilono; kaj post kiam li rigardis ĝin senmove dum longa tempo, li ordonis la malkonstruon kaj formeton de la pavilono.

Je la venonta tago li venis kaj diris nenion, kaj same dum la venonta kaj postvenonta tagoj. Tiam, dum du tagoj, li tute restis for. Poste li revenis, kune kun arĥitekto, du majstraj metiistoj kaj eta sekvantaro.

Kune starante en silento en eta grupo, ili ĉirkaŭrigardis inter la serena vasteco de sia sukceso. En ĝia perfekteco restis neniu spuro de penado. Ŝajnis, kvazaŭ la dio de l' beleco de la naturo akiris ilian idon al si mem.

Nur unu afero difektis la absolutan harmonion. Estis tie iu misproporcio je la sarkofago. Neniam ĝi estis pligrandigita. Ĝi defiis la okulojn; ĝi interrompis la fluon de la linioj. En tiu sarkofago estis la ĉerko el plumbo kaj arĝento, kaj en la ĉerko el plumbo kaj arĝento kuŝis la reĝino, la kara senmorta kaŭzo de ĉiu tiu beleco. Sed nun la sarkofago ŝajnis esti neniu pli ol eta malhela oblongo, kiu kuŝis malkonvene en la granda koridoro de la Perlo de Amo. Estis kvazaŭ iu faligis etan valizon en la kristalan maron de la ĉielo.


Dum longa tempo la princo cerbumis, sed neniu sciis pri la pensoj, kiuj trapasis sian animon.

Finfine li parolis. Li montris.

"Formetu tiun aĵon," li diris.

de **H. G. Wells**

tradukis kaj sendis **Frank Lappe** el Germanio



Genezo

Kaj diris Dio: estu lumo. Kaj estiĝis lumo. Kaj Dio vidis, ke ĉi tiel estas bone.

Kaj ekvidis la lumon la Diablo kaj palpebrumis pro la brilo, kaj diris: «Aŭ kio estas ĉi tio? Ĉu vi kontraŭagas min?» Kaj diris per laŭta voĉo: «estu mallumo!»

Kaj estiĝis taglumo kaj nokto je la unua tago.

Duatage Dio disigis la ĉielon de la tero kaj kreis la ĉielvolbon.

Kaj ekkoleris la Diablo en sia koro kaj diris: «estu ĉielbrua tempesto, glaciplena hajlo kaj kirlego de ventoj!»

Kaj estiĝis la ĉielvolbo kun tempesta bruoj, kun hajlo kaj kun ventegoj je la dua tago.

Tiam diris Dio: «estu kontinentoj, kiuj donas sekuran grundon, estu sur ili molaj herboj kaj multaj fortaj arboj, kiuj kreskigas dolĉan frukton, kaj estu akvoj, kiuj aspergas kaj fekundigas la sekan teron».

Kaj diris la Diablo: «estu vulkanoj sur la kontinentoj, por ke ili ne fariĝu sekura grundo. Estu inundoj de la akvoj kaj estu naŭzaj vermoj en la dolĉaj fruktoj!»

Kaj daŭris la frida milito inter Dio kaj Diablo je la tria tago.

Diris tiam Dio: «estu akvaj bestoj kaj rampaj bestoj flugadu birdoj super la tero kaj estu ĉiaspecaj bruoj, bovoj, ŝafoj, kokoj kaj kolomboj!»

Sed diris la Diablo: «estu ŝarkoj en la akvoj kaj vipuroj kaj lupoj sur la tero kaj estu ĉiaspecaj nocivaj bakterioj!»

Kaj estiĝis vivo kaj morto je la kvara tago.

Kaj diris Dio: «Ni kreu homon laŭ nia propra modelo kaj simileco kaj li regu la fiŝojn de la maro, la birdojn de la ĉielo kaj la brutojn sur la tuta mondo. Jen, mi donacas al li la grendonan spikon kaj

fruktodonan arbon por lia bonfarto, ke lian koron serenigu feliĉo».

Kaj vidis Dio, ke ĉio, kion Li kreis, jen, estas bona kaj taŭga al la celoj.

Sed diris la Diablo: «Ni kreu ŝtatestron kaj militestron. Advokaton, ekzekviston, patrioton kaj flatintriganton laŭ nia propra modelo kaj simileco».

Kaj vidis la Diablo, ke ĉio, kion li kreis, jen, estas malbona kaj taŭga al la celoj.

Sed li diris en sia koro: «tamen mi vane faris mian senlacan paclaboron, se la agreso de la detruema malamiko ĉion nuligas per sia perforta kontraŭago».

Kaj diris laŭtvoĉe al la Sinjoro:

— Efektive kial ni devas konkurenci, Dia Moŝto? Ĉu ni ne povus eble kunlabori en paca kunvivo kaj interkonsento?

— Kiel vi opinias la kunlaboron? — demandis la Sinjoro.

— Provu ni eble krei konkorde, tiamaniere, ke mi kaj vi kunlaboras en la kreado laŭ kvindek-procenta kontribuo!

— Nu, estu laŭ via deziro Maldia Moŝto, — respondis la Sinjoro. — Ni kunmetu niajn kapablojn kaj kreu ni ion kune.

Kaj tiam ili distranĉis la homon al du seksoj. Estiĝis viro kaj virino.

Kaj estiĝis amo je la sesa tago por etern-eterne.

Kaj ambaŭ kreintoj vidis, ke ĉi tio kaj ĉi tiel jam estas tre bona kaj malbona kaj tre taŭga kaj je la sepa tago ili ambaŭ ripozis.

(1965)

Fonto: <http://esperanto-mv.pp.ru/Szathmari/index.html>



La poemo de Hjálmar estas verkita en Islando kredeble en la 12-jarcento. Ĝi ne troveblas en la manuskripto de la Edda poemoj, kvankam ĝi forme kaj teme tute apartenas al ili. La herooj Örvar-Oddur kaj Hjálmar la Kuraĝa batalas kontraŭ vikingoj, el kiuj unu aspiris al la reĝidino en Upsalo (Uppsala en Svedujo), la fianĉino de Hjálmar. Ili sukcesas venki la vikingojn, sed Hjálmar ricevas fatalan vundon. Mortante li eldiras

Oddur: 1 Kio al vi, Hjálmar?
Haŭto mortpalas,
certe febligas
vin lezaj vundoj;
kasko fenditas
kaj dura kiraso;
vidas mi vivon
vin forlasi.

Hjálmar: 2 Dekses vundojn
kaj veston taŭzitan
mi havas, kaj vidon
volvis nigreco;
koron enkuris
klingo glava,
akra rapiro
pinte venena.

3 Kvin mi havis
kulturkampojn,
sed min tedis
terlaboroj;
nun mi kuŝas
kontraŭ morto,
vundita glave
sur Griz-insulo.

4 Trinkas en halo
de l'hejmo patro
bieron noblaj
eskortuloj;
lacigas viglajn
virojn drinkado,
sed min glavspuroj
spasme turmentas.

la poemon, li pensas pri sia amatino, kiun li neniam revidos, li rememoras ilian lastan renkonton kaj la gajajn tagojn en la hejmo de la patro, kaj finas salutante la korvon kaj la aglon, kiuj alflugas por ŝirmanĝi lian korpon. Tiu ĉi mallonga poemo havas belan elegian tonon kaj elspiras profundan sopiron kaj malĝojon. La traduko konservas la originalan aliteracion komence de akcentsilaboj. La trad.

5 Forlasis mi
la lume belan,
brilevestitan
tronulinon.
Veriĝos diroj
drastaj ŝiaj,
ke mi revenos
post venko neniam.

6 Forlasis mi
allogajn kantojn
de junulinoj
pro luktoj armilaj;
pene rapidis
forvelante
lastan fojon
de amikoj miaj.

7 Movu de mano
ruĝan ringon,
portu al larma
filino de l'reĝo;
knedos ŝian
koron ĉagreno,
ke ne mi venos
denove Upsalon.

8 Korvo grake
de granda arbo
flugas kaj aglo
akompanas;
al aglo alta
mi donas propran
predon kaj mian
sangon salan.

(Baldur Ragnarsson, Norda Prismo, 4, 1957)

Meditaĵoj de Millôr Fernandes

-- el revuo La Lampiro



Millôr Fernandes (Rio-de-Janeiro, 1 923-2012) estis brazila desegnisto, humoristo, verkisto, dramisto, poeto, tradukisto kaj ĵurnalisto. Li publikigis siajn tre originalajn verkojn en pluraj revuoj kaj ĵurnaloj, preskaŭ ĉiam kun forta ironio, sarkasmo kaj pikanta kritikemo.

-- Homoj, kiuj tro multe parolas, ĉiam mensogas, ĉar fine elĉerpiĝas ilia stoko da veraĵoj.

-- Tedulo: homo kiu interesiĝas pri ni pli multe, ol ni interesiĝas pri li.

-- Kiel admirindaj estas homoj, kiujn ni ne bone konas!
-- Demokratio estas kiam mi ordonas al vi, diktaturo estas kiam vi ordonas al mi.
-- Neniam eldiru mensogon, kiun vi ne povus pruvi.
-- Ni devas ne rezisti kontraŭ tentoj: eble ili ne revenos.
-- Neniu scias, kion vi aŭskultas, sed ĉiuj tre bone aŭskultas, kion vi diras.
-- Homo estas sincera ateisto nur kiam li perfekte sanas.
-- Stelu ankoraŭ hodiaŭ! Morgaŭ eble tio estos neleĝa.

(Esperantigis Paulo Sérgio Viana el Brazilio)

Fonto: "La Lampiro" 60-a jaro, numero 158, 2019:4

Unu fojon, la Ĉina Imperiestro oferdonis al la reĝo de Annam-o¹ persikojn en neordinara grandeco nomitajn persikoj de longa vivdaŭro.

La donaco estis alportata dum reĝa aŭdienco. La korteganoj vete admiris la mirindajn fruktojn. Trang Quynh², kiu estis tie, ĉar li estis ankaŭ altoficulo, proksimiĝis al la persikoj, ekprenis unu frukton, ĝin enbuŝigis kaj apetite krakmanĝis.

- Arestu ĉi-tiun krimulon, kaj fortranĉu al li la kapon! - Ordonis la monarko, pala de kolero.

La oficiroj de la kortego sin ĵetigis sur la povran Trang Quynh, kiu tiam plorĝemis kvazaŭ bovido.

- Vi, kiu havis la aŭdacon gustumi tiujn fruktojn destinitajn al via suvereno

- krimo, kiun vi devas pagi per la vivo, kaj nun vi timas morti, fia kaj mallkuraĝa kanajlo! - kriis la reĝo.

- Ne, Via Reĝa Moŝto, - respondis Trang Quynh, ekploregante; se mi ploras, pensu, ke mi timas por

Via Plej Nobla Persono, ĉar Vi baldaŭ mortos.

- Kian stultaĵon vi ankoraŭ rakontas al mi, frenezulo! Kiu diris al vi, ke mi baldaŭ ĉesos vivi?

Nu! Via Reĝo Moŝto, vidante tiujn persikojn, kiuj nomiĝas persikoj de longa vivdaŭro, mi volis manĝi unu frukton, ĉar mi deziris vivi ankaŭ plejeble longatempe. Sed mi ankoraŭ ne finmanĝis la kvaronon de la frukto, jam la morto senaverte venis por min kapti ĉe la kolo. Tio kondukis min al la konkludo, ke se Via Reĝa Moŝto nesignardeme manĝus ĉiujn restantajn persikojn, Vi nur pli rapide mortos.

Oni liberigu tiun maliculon! - diris la reĝo, amuzate de tiu aŭdaca ŝerco.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-persikoj-de-longa-vivdauxro/>

Notoj

- 1) Malnova nomo, kiun la ĉinaj feŭduloj donis al Vjetnamio kaj kiu signifas La pacigita Sudo.
- 2) Persono de la XVIIIa jarcento, tre populara pro siaj bravaj agoj, siaj spritaĵoj kaj aparte siaj pendumindaj trompaĵoj, laŭ la maniero de German Till Eulenspiegel, kies viktimoj estis precipe la potenculoj kaj la riĉuloj.

Vortareto

- * **aŭdienco** - oficiala akcepto de vizitanto(j), petanto(j) ĉe regnestro aŭ altrangulo.
- * **fordoni** - tute kaj definitive doni.
- * **gustumi** - ŝati, ĝui, sperti la guston de io.
- * **kanajlo** - senhonora homo, kun malnoblaj instinktoj.
- * **kortego** - konstanta loĝejo de princo aŭ suvereno kaj tuto de la gravaj personoj, kiuj tie loĝas.
- * **kolero** - senti fortan agitiĝon de la animo, kaŭzata de ofendo aŭ nekontenteco, kaj tion montri vorte aŭ fare.
- * **oferdoni** - fordoni kiel oferon.
- * **pala** - perdinta sian naturan ruĝetan koloron, blanketa.
- * **povra** - kompatinda.
- * **veti** - interkonsenti pri monsumo aŭ valorajo, ordinare ambaŭflanke egala, kiun la persono, kiu montriĝos malprava, devos pagi al la alia.



Solve de la krucvort-enigmo

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| | C | E | P | O | N |
| L | E | P | O | R | O |
| A | R | | R | I | M |
| N | I | A | | G | I |
| D | O | R | M | U | S |
| O | N | D | I | S | |

Facilaj rakontoj

Tri eroj el la lernolibro „Vojaĝo en Esperanto-Lando“
de Boris Kolker

NEOLOGISMOJ – POR KAJ KONTRAŬ

Zamenhof mem estis tre tolerema kontraŭ neologismoj, li avertis sole: „ne tro krude, ne tro multe per unu fojo“. Jen kelkaj citaĵoj de li: „mi havas nenion kontraŭ la enprenado de tiuj vortoj“; „neologismoj... nenion ŝanĝante, nek rompante, prezentas por lingvo nenian danĝeron“; „Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen danke al la reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas sian kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua“; „Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la esperanta vortfarado“.

K. Kalocsay

Neologismo. // Enciklopedio de Esperanto. – Budapeŝto, 1979, p. 390-391.
Mallongigita.

PRI NACIONALISMO

Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devas esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas ne nobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

L.L.Zamenhof.

Por kaj kontraŭ reformoj
(Plena verkaro de Zamenhof, kajero 8) –
Kioto, 1980, p. 88-90. Fragmento.
Temas pri unika rekomendinda lernolibro.

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

El la libro „Rakontu samideano...“

V. Setälä, Finnlando



Doktoro Fiŝer rakontas

Vojaĝante al ekstrema oriento mi sidis en restoracia vagono de Bukaresto al Konstantinopolo. Mi observis, kiel iu eksterlandano vane penas paroli al kelnero. La kelnero uzis sian tutan lingvoscion: li parolis rumane, serbe, turke, bulgare kaj ruse,. Sed ĉiam sen sukceso. La fremdulo ne komprenis eĉ unu vorton. Mi alproksimiĝis kun deziro helpi. Krom la rumana mi parolas sep lingvojn kaj mi demandis lin germane, france, angle, itale, hungare, hispane kaj greke. Ĉio vane. La fremdulo komprenis nenion el dek du lingvoj. Tiam mi ekmemoris artikolon pri Esperanto, kiun mi legis antaŭ kelka tempo en gazeto, sed al kiu mi tiam ne turnis atenton kaj mi finis klopodon per la demando: „Ĉu vi parolas esperante?“

„Jes, mi parolas,“ li respondis kun ĝojkrio. Kaj li daŭris per lingvo, kiun mi tute ne komprenis, ĉar tiu dirita frazo estis la sola frazo en Esperanto, kiun mi konis. Kaj kiam la fremdulo rimarkis, ke mi komprenas nenion, li sciis bonan rimedon – li donis al mi „ŝlosilon de Esperanto“, kiu ekzistas en multaj lingvoj. Kvankam ĝi estis nur malgranda kajereto, ĝi enhavis la tutan gramatikon kaj sufiĉan vortaron de la internacia lingvo.

Mi tuj komencis studi la libreton kaj post dek horoj, kiam ni estis jam sur ferdeko de ŝipo, mi jam povis paroli per Esperanto. Mi kaptis informon, ke mia kunvojaĝanto estas finno kaj scias kvar lingvojn – svedan, danan, norvegan kaj finnan. Ni tri – la finno, la kelnero kaj mi – parolis kune dek ses lingvojn, kaj tio tamen ne sufiĉis por ke ni komprenu unu la alian.

De tiu tempo mi estas fervora esperantisto.

Fonto: **Legolibreto 1** de Jindřiška Drahotová